

Bulgara Esperantisto

Junio 1991



ENHAVO

- 4 Decidoj de BEA-Estraro (G. Mihalkov)
5 Vidpunktoj pri verba transitiveco en Esperanto (B. Golden)
9 Poezia vespero (G. Iliev)
12 Instruprogramoj de BEA: Unua grado
14 Beletro: "Fratoj" (El. Pelin, trad. Il. Kolev)
15 Originala verkaro (N. Pilev)
19 Kolektado: Praktikaj sciindaĵoj (N. Nikolov)

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimitar HAĜIEV, Georgi MIHALKOV, Kiril VELKOV, Krastju KARUCIN, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio - Bulgario, tel. 22-80-86

Ofsetpresejo ĉe Firmao "Pres-Esperanto", str. "Angelov vrĥi" 23, Sofio.

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas unu monaton antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario "Bulgara Esperantisto" estas abonebla per la poŝto kontraŭ 9.60 lv. Por aliaj landoj - pere de naciaj poŝtoj kaj UEA (kodo: prsp-r) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 ned. gld. aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando pagita ĉe la redakcio de "BE" estas 25 lv. Prezo de unuopa ekzemplero - 1.00 lv. aŭ 3 ned. gld.

"Bulgara Esperantisto" tutjare estas abonebla ĉe Firmao "Pres-Esperanto". Jarabono por 1991 de "BE" estas 12.00 lv.

REKLAMTARIFO

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
990 gld.	495 gld.	247 gld.	123 gld.

La Redakcio de "BE" aperigas reklamojn en diversaj lingvoj ofertitajn de bulgaraj aŭ eksterlandaj entreprenoj, organizoj aŭ privataj personoj. Maklerajo por havigo de reklamoj 20%. Movada rabato 50%. Ekstera kovrilpaĝo kosta 50% pli. Rabato por tuja ripeto 20%.

"Bulgara Esperantisto" havas abonantojn en 57 landoj.

Represo el "BE" permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de "Bulgara Esperantisto" por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: V. Mitev (dekstre) kaj G. Mihalkov dum Poezia vespero (p. 9). Foto: K. Savova

Niaj perantoj

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000
ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 11-1105,
70084-BRAZILIA-DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield
Road, North Thoresby, Great
Grimsby, SOUTH
HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

Federation Esperantiste du
Travail, 115, Rue Beranger,
F-92320 CHATILLON

Union Francaise Pour
L'Esperanto, 4 Bis, Rue de la
Cerisaie, F-75004 PARIS

HISPANIO

Jorge Moragues Penella,
Pintor Domingo 2-2, 46001
VALENCIA

IRLANDO

Esperanto-Asocio de
Irlando, 9 Templeogue Wood,
DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono
1-2418-18, TOKORAZAWA,
359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. "Dame
Gruev" 65, YU-96000 OHRID

PORTUGALIO

Portugala
Esperanto-Asocio,
A.S. Almeida, R. Dr. Joao
Couto, 6, r/c.A, P-1500
LISBOA

SUD-AFRIKO

C.S. Beckford, P.O. Box.
1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League for
North America, Inc. P.O. Box
1129, EL CERRITO, CA,
94530

AGADRAPORTO

de la Estraro de BEA
(julio 1990 - majo 1991)

I. ENKONDUKO

La Estraro de BEA decidis ĉiujare aperigi en "Bulgara Esperantisto" raporton pri sia agado, kiu estas ĉefe laŭ la prioritatoj de BEA. Tiu ĉi raporto enhavas la informojn de la estraranoj, kiuj respondecas pri la koncernaj fakoj el la agado de BEA kaj de la kunlaborantoj en la Centra Oficejo, kiuj plenumas la ĉiutagan laboron kaj realigas la decidojn de la Estraro. La raporto traktas la periodon de la 15-a de julio 1990 ĝis la 15-a de majo 1991.

II. ADMINISTRADO KAJ EKONOMIA AGADO

Laŭ la nova Statuto de BEA unuan fojon en la historio de bulgara Esperanto-movado, la oficistoj en la Centra Oficejo de BEA estis dungitaj surbaze de konkurso. Kompetenta Komisiono elektis la plej kapablajn junajn kandidatojn, kiuj posedas bonege la Lingvon Internacian kaj havas riĉajn organizajn spertojn.

Dum tiu ĉi periodo la Estraro dediĉis multan energion por jure aranĝi la materialan bazon de BEA. Estis detale esploritaj la eblecoj por la daŭrigo de la konstruado de la Sofia Esperanto-domo sur strato "Ŝipka". Estis subskribita

kontrakto kun privata firmao en Plovdiv, kio helpas la financon de BEA kaj subtenas la agadon de la Esperanta Kulturdomo en Plovdiv. La Estraro detale pridiskutis kaj analizis la agadon de la firmaoj "Esperanto-Turist", "Globus", "Pres-Esperanto" kaj "Majak" en Veliko Tŕrnovo. Pro financa neefektiveco estis likvidita la firmao "Esperanto-Turist". Estis maldungita la direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, P. Panov kaj elektita nova estraro de la Kursejo, kiu devas plibonigi la agadon de tiu ĉi grava bazo de BEA.

III. INSTRUA AGADO

La instrua agado celas radikalajn ŝanĝojn por plibonigo de la lingva nivelo. Ĉi-jare en la ĉeestaj kursoj por komencantoj, progresintoj kaj en superaj lernejoj Esperanton lernis 824 personoj en 60 diversaj grupoj. Krom la ĉeestaj, estis organizita ankaŭ foresta aŭ koresponda instruado de Esperanto. Estas verkita la krestomatio "Ek al leg'!" - en du volumoj por progresantoj, kompilita de Hektor Alos i Font kaj dr. sc. Kiril Velkov. Estas preta nova lernolibro por komencantoj. La 1-an de decembro 1990 estis organizita Konferenco de Esperanto-instruantoj,

kiuj pridiskutis la projekton de la novaj instruprogramoj. La programoj jam estas pretaj por presado. Startis la preparlaboro de la someraj Esperanto-kursoj en Varna de la 6-a ĝis la 18-a de julio 1991 kaj en Pisanica de la 1-a ĝis la 13-a kaj de la 14-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1991.

IV. KULTURA AGADO

En la kultura agado kontribuis la profesinivela kaj memstara laboro de la plejparto el la aktivularo. Domoj pri Esperanta kulturo estas tie, kie la esperantistoj havas tiun bezonon kaj per sia laboro ili strebas allogi ne multajn, sed verajn esperantistojn kaj amikojn de Esperanto. Grava momento en ilia agado estas la organizado de aranĝoj por neesperantista publiko. La organizitaj aranĝoj varias - vesperoj pri lingvaj temoj, vesperoj de poetoj, parolanta gazetaro, informpartoj, sanprogramoj, prelegoj. En la komenco de la kuranta jaro la Estraro iniciatis la organizadon de ĉiumonataj kulturaj aranĝoj, celante ĉefe la disvastigon de la Esperanta kulturo al neesperantistoj. Tiaj estis la teatraj prezentoj de "Venontjare denove kune" de Angelina Sotirova en Svištov, Vraca kaj Sofio kaj "Enŝteliĝi en la koron" de Julian Modest en Jambol. Estis organizita vespero, dediĉita al ĉina kulturo kun reprezentantoj de Ĉina Ambasadego kaj solena koncerto en kulturdomo "Slavjanska Beseda", en kiu partoprenis Koruso de sofiaj esperantistoj, la kantgrupo el 8-a lernejo kaj la geaktoroj Luna Davidova, Teo Jurukov, Miĥail Ferdotov k.a. Estis solene celebrata la 100-jara jubileo de Ivan Krestanov.

V. SCIENCA AGADO

La scienca agado de BEA estas dividita en du ĉefaj subfakoj: a) biblioteka kaj muzea agado kaj b) scienca agado.

A. BIBLIOTEKA KAJ MUZEA AGADO

Post longa paŭzo kaj neregula funkcio la Muzeo kaj biblioteko de BEA estis oficiale malfermita la 1-an de decembro 1990 por la Esperanto-legantoj. La Estraro de BEA akceptis kaj aprobis la novan Statuton de la Muzeo kaj la biblioteko. Dum mallonga tempo signife pliriĉiĝis la fonduso. Valorajn donacojn faris Violin Oljanov, Vasja Cvetkova,

Bogomil Jivkov, Ljubomir Trifonĉovski, Lada Hitrova kaj aliaj. Estis aĉetitaj valoraj libroj. Pro la fakto, ke Bulgara Esperanta Muzeo kaj biblioteko estas same sciencesplora centro, estis starigitaj kontaktoj kun la Tutmonda Esperantista Bibliotekista Asocio en Usono kun la Terminologia Esperanto-Centro en Zagrebo, Jugoslavio kun la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Aŭstrio.

B. SCIENCA AGADO

La Estraro de BEA iniciatis fondon de filio de AIS-San Marino en Bulgario kaj pro tio estis esploritaj la nunaj kondiĉoj en nia lando kaj prezentitaj oficialaj dokumentoj al Ministerio pri Supera Klereco kaj al Teknika Universitato en Sofio. Estis organizita la Naŭa Sesio de la Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Târnovo, kiu okazos de la 13-a ĝis la 17-a de julio 1991. Raja Androvska, studentino en Bibliografia Altlernejo pretigis sian diplomlaboron "Esperanta bibliografio de Kunĉo Vâlev". Komenciĝis la laboro pri Esperanta Leksikono, kiu enhavos indikojn pri la plej gravaj momentoj el la historio de la internacia kaj bulgara Esperanto-movadoj. Estis organizitaj pluraj prelegoj en Esperantaj kulturdomoj en Sofio, Plovdiv, Burgas, inter kiuj elstaras la prelegoj de la korea esperantisto prof. d-ro pri ekonomiaj sciencoj Insu So.

VI. ORGANIZA AGADO

En Stara Zagora, Miĥajlovgrad kaj Burgas okazis seminarioj kun Esperanto-aktivuloj. Dum la kuranta jaro pluraj Esperanto-societoj en Sofio kaj en la provinco ĉesigis sian agadon pro financaj kaj aliaj kialoj, tamen aperis kaj reaperis kelkaj novaj faksocietoj en Stara Zagora, Sofio kaj alie. La kunlaborantoj en firmao "Pres-Esperanto" same fondis Esperanto-societon. Novan societon fondis la Koruso de sofiaj esperantistoj. Ĉiuj novaj societoj estis registritaj kaj iliaj estraroj ricevis la Statuton de BEA. Por la plibonigo de la Esperanta agado en la ĉefurbo kaj pro la manko de Esperanto-klubejoj estos restarigita la sofia Esperanto-societo "Maksim Gorkij", kiu aktivigos la grandan parton de la sofiaj esperantistoj. La plivigliĝo de la fakaj societoj plibonigos la agadon de la sekcioj, kies prezidantoj kunsidis en

Sofio la 7-an de majo 1991. La 11-an de majo 1991 en urbo Kazanlâk okazis Nacia Konferenco de la Junulara Esperanto-sekcio.

VII. INTERNACIA AGADO

La Estraro de TEJO akceptis la proponon de la Estraro de BEA pri la okazigo de la 49-a Internacia Junulara Kongreso en 1993 en Vraca. Komenciĝis la preparlaboro, jam estas la oficialaj permesoj de la urbestro de Vraca kaj de la Ministerio pri eksteraj aferoj, formiĝis Loka Kongresa Komitato. Ĉi-somere estos subskribita la kongresa kontrakto. La Kooperativo de Literatura Foiro akceptis la proponon de la Estraro de BEA okazigi venontjare en Vraca la 11-an Internacian Literaturan Forumon, kies temo estos "La porinfana esperantlingva literaturo kaj kulturo - ĉu literaturo kaj kulturo nur por denaskaj esperantistoj?".

La Estraro de BEA pliĝustigis la liston de la deligitoj de UEA kaj aktualigis la informojn en la Jarlibro de UEA. Nun 45 bulgaraj esperantistoj membras en UEA pere de BEA. La Estraro celas, ke pli da bonaj junaj esperantistoj membru en UEA kaj havu la eblecon aboni revuon "Esperanto" pere de BEA.

VIII. ELDONA AGADO

"Pres-Esperanto" eldonis novajn librojn en kaj pri Esperanto, kies temaro ege varias. Pro financaj kialoj la Estraro ĉesigis la eldonon de "Paco" kaj "Scienca Mondo". La bulgarlingva revuo "Panorama Esperanto" aperos unufoje jare kiel almanako. Post detala analizo de la enhavo kaj la aktualeco de "Bulgara Esperantisto" la Estraro decidis reguligi ĝian aperritmon kaj de majo j.k. la asocian organon oni presadas en la presejo ĉe firmao "Pres-Esperanto". En Bulgario daŭre kun la financa subteno de BEA aperas la internaciaj bultenoj "Muziko" - organo de Muzika Esperanto-Ligo, "Medicina Kuriero" - organo de Universala Medicina Esperanto-Asocio kaj "Interligilo" - organo de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio.

IX. INFORMADO KAJ LIBROSERVO

En la sfero de la informado la streboj

de la Estraro estis pri tuja sendado de Esperantaj informoj, ricevitaĵoj de eksterlando al bulgara esperantistaro, kio efektiviĝis per preparo de "Informilo". Ĝi aperis en tri numeroj, en kiuj estis decidoj de la Estraro, kulturaj, instruaj, organizaj, sciencaj informoj, individuaj publikaĵoj de aktivuloj, informoj pri enlandaj kaj eksterlandaj Esperantaj aranĝoj kaj reklamoj. Aperis pluraj artikoloj kaj informoj pri Esperanto en diversaj bulgarlingvaj revuoj kaj gazetoj kiel "Duma", "Demokracia", "Veĉerni novini" k.a. Plimultiĝis la informoj pri la Esperanta agado en nia lando en la internaciaj esperantlingvaj revuoj kiel "Esperanto", "Heroldo de Esperanto" k.a. La Estraro iniciatis fondon de Libroservo en la Centra Oficejo, kiu enhavas plurajn valorajn Esperanto-librojn kaj esperantaĵojn.

X. FINAJ VORTOJ

En la nuna ege malfacila socia, ekonomia kaj kultura periodo en nia lando, la Estraro de BEA faris ĉion eblan serioze kaj responde plenumi siajn devojn kaj kontribui al la evoluo de la Esperanto-movado en Bulgario. Ĉio, kion entreprenis kaj realigis la Estraro, estis laŭ la nova Statuto de BEA, akceptita dum la 42-a Kongreso en Ŝumen kaj laŭ la prioritatoj de BEA. Kompreneble en tiu ĉi raporto ne eblas indiki detale la tutan agadon de la Estraro, sed la menciitaj faktoj elokvente montras, ke la Estraro havis multajn iniciatojn, sukcese realigis plurajn siajn ideojn kaj tiamaniere preparis la vojon por la nova progreso de la Esperanto-movado en nia lando. En tiu ĉi raporto vi ne trovos la financon Aldonaĵon, kiu estis prezentita kaj detale pridiskutita dum la kunsido de la Komitato de BEA la 1-an de decembro 1991 en Sofio. Nun antaŭ la Estraro de BEA staras pluraj novaj taskoj kaj devoj, kaj la Estraro ne dubas, ke per siaj unueco, energio, ambicio kaj granda amo al Esperanto inde plenumos ilin.

La raporton kompilis:

Georgi MIHALKOV,
proparolanto kaj ano de Estraro de BEA

DECIDOJ

de BEA-Estraro

La 6-an de marto 1991:

- Ljubomir Trifončovski estu prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 49-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazos en julio 1993 en urbo Vraca.
- La Estraro aprobis la planon pri la preparlaboro por la Internacia Junulara Kongreso. Ĝi devas komenciĝi jam en marto 1991. Oni devigas la prezidanton de LKK de IJK regule informi la Estraron pri la preparlaboro.
- La Estraro aljuĝas honoran insignon al la verkisto kaj aktiva esperantisto Stefan Ĉirpanliev el Jambol pro lia multjara aktivado en la kampo de la Esperanto-literaturo.
- Enjo Enev, ano de la Estraro, oficiale partoprenos kaj reprezentos BEA en la Kongreso de IFEF en majo 1991 en Olomouc, ĈSFR.

kaj redaktoroj de literaturo, inkluzivita en la eldonplanon de BEA, rekte sen peranto. La transpagon de la honorarioj, laŭ tiuj ĉi kontraktoj, faros la Financa Fako de CO de BEA, sen peranto.

- En numeroj 6-9/1991 de revuo "Bulgara Esperantisto" devas aperi la lasta varianto de la novaj instruprogramoj.

- La ekzamenoj por la unuagradaj Esperanto-kursoj estu sen notoj; en la atestiloj oni skribu: "kun rezulto sukcesa".

- La Estraro esprimas dankon al Hektor Alos i Font kaj dr. sc. Kiril Velkov, kiuj kompostis la ambaŭ volumojn de Esperanta krestomatio "Ek al leg'!" - konsistanta entute el pli ol 400 paĝoj kaj rezignis ricevi honorariojn.

- La Estraro proponas por la eldonplano de BEA por 1992 la libron "Historio de Bulgara Esperanto-movado (1887-1907)" de Canko Murgin.

La 23-an de marto 1991:

- BEA kontraktos kun aŭtoroj, kompilintoj

Georgi MIHALKOV,
proparolanto de la Estraro de BEA

IX Sesio de ISEU (13.07. - 17.07.1991, Veliko Târnovo, Bulgario)

ORGANIZANTOJ: BEA, Universitato " St. St. Kiril i Metodij" kaj Esperanto-societo "Lumo" en Veliko Târnovo.

ALVENTAGO kaj ENLOĜIGO de la partoprenontoj: 13.07.1991 ĝis la 14-a h. La inaŭguro de ISEU okazos je 5-a h. La Interkona vespero komenciĝos je la 19-a h. la saman tagon.

FORVETURO: 17.07.1991 post la tagmanĝo.

ALIĜKOTIZO: 160 levoj por bulgaroj, 220 levoj por esperantistoj el Sovetunio, Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Rumanio; por ĉiuj aliaj eksterlandanoj - 80 dolaroj aŭ egalvalora konvertebla valuto. La bulgaroj pagos per poŝtmandato, la fremduloj - surloke. Oni povas aliĝi aparte nur por iu(j) tago(j). La kotizo potage estas 40 levoj.

LIMDATO: 17.06.1991. Bonvolu sendi la aliĝilojn kaj poŝtmandatojn al adreso: Dora Doseva Koseva, Esperanto-societo "Lumo", P.K.121, 5 000 Veliko Târnovo, Bulgario.

Kadre de ISEU okazos INTERNACIA EKZAMENO de ESPERANTO UEA/ILEI.

Dum ISEU'91 prelegos:

GEORGI MIHALKOV (Bulgario): "Julio Baghy - vivo kaj verkaro".

ISTVAN ERTL (Hungario): "Tendencoj de nuntempa originala literaturo", "La infana raso" de W. Auld".

Prof. d-ro KIRIL POPOV (Bulgario): "Nisavu la vivon".

Dr. sc. KIRIL VELKOV (Bulgario): "Esperanto kaj kosmo", "Aktuale pri la nifoj".

MARIA-ANTONIA LADALARDO (Brazilo): "La problemoj de la imunologio".

NIKOLA UZUNOV (Bulgario): "Influo de la slavaj lingvoj en Esperanto", "La rolo de Esperanto en estonteco".

PETKO ARNAUDOV (Bulgario): "Historiaj notoj pri matematiko".

Doc. STOJČO STOJČEV (Bulgario): "Evoluo de la komputiloj".

ZOFIA BANET-FORNALOWA (Pollando): "Cent jaroj de Esperanto- teatro", "El la ĉartoj de la Esperanto-laborista movado".

JERZY FORMAL (Pollando), esperanta aktoro, prezentos unuaktajn teatraĵojn: "Wolfgangier!", "Tajdoj de la vivo".

Krome okazos urbotrarigardo, duontaga ekskurso al arkitektura rezervejo "Arbanasi", oni prezentos la ĵus aperinta duvoluma krestomatio "Ek al leg'!"

Bernard GOLDEN

VIDPUNKTOJ PRI VERBA TRANSITIVECO EN ESPERANTO

1. Eternaj eraroj + universalaj eraroj = aktuala demando

Lastatempe la temo de transitiveco de verboj en Esperanto altiris la atenton de pluraj esperantologoj, instruantoj de la lingvo kaj ankaŭ interesitaj laikoj. De 1988 ĝis 1990 kontribuoj al la diskuto estis publikigitaj en revuo *Esperanto*, kaj frue en 1990 du konferencoj de pedagogoj, unu en Hungario, la alia en Nederlando, okupiĝis pri didaktikaj problemoj de transitiveco.

1.1. Eternaj eraroj

Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto okazigas eternajn erarojn, ĉar ĉiu generacio de lernantoj stumblas kontraŭ la sama malfacilaĵo. Duboj pri la ĝusta formo de verboj estiĝis tre frue en la historio de la lingvo. Jam en 1910 Emile Boirac, en la "Antaŭparolo" de sia *Plena Vortaro*, konsilis, ke la du sufiksoj "-ig" kaj "-iĝ" estu uzataj "nur en okazo de efektiva bezono". Ses jardekojn post publikigo de la komento de Boirac, alia leksikografia verko, *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV, 1970) ankoraŭfoje riproĉis esperantistojn, kiuj uzas la transitivigan sufikson "-ig" kiel necesan karakterizilon de ĉiu transitiva verbo, tiel superflue kaj taŭtologie aldonante ĝin al simplaj transitivaj radikverboj, kiuj tute ne bezonas ĝin (kapvorto "-IG", pĝ. 411, Rim. 5). Nun, okdek jarojn post la admono de Boirac kaj du jardekojn post la klarigo de PIV, samspecaj eraroj ankoraŭ makulas tekstojn en Esperanto kaj agacas orelojn en konversacioj.

1.2. Universalaj eraroj

Eraroj en la uzo de transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto estas ankaŭ universalaj eraroj, ĉar ili karakterizas la lingvouzon de amaso da parolantoj de la lingvo, senkonsidere de ilia gepatra lingvo, nivelo de alproprigo de Esperanto, edukiteco kaj inteligenteco. Vere konsterna estas la

misuzo de verboformoj, ne en la parola kaj skriba lingvo de komencantoj, sed en verkoj de multjaraj spertuloj, t.n. bonaj verkistoj kaj membroj de la Akademio de Esperanto.

2. Kialoj de la neinstruebleco kaj nelernebleco de verba transitiveco

La eterneco kaj universaleco de erara uzo de verboj postulas, ke oni serĉu la kialojn. Kvar kontribuantaj faktoroj prezentas sin: 1. nekapablaj lernantoj; 2. nekompetentaj instruantoj; 3. mankhavaj lerniloj; 4. malfacila lingvo.

2.1. Nekompetentaj lernantoj

Troviĝas en ĉiu kurso plej diverse dotitaj lernantoj, inter kiuj estas tiuj, kiuj ne kapablas enkapigi eĉ la plej simplajn gramatikajn regulojn. Kelkaj estas malinteligentaj, aliaj maldiligentaj aŭ apatiaj, sed ne ĉiuj apartenas al tiuj kategorioj. Oni ne forgesu, ke ĉiuj lernantoj, la mense aktivaj same kiel la malpli kleraj, sukcesis lerni sian gepatran lingvon sen la helpo de gramatikaj reguloj.

2.2. Nekompetentaj instruantoj

Estas sciate, ke la plejmulto de la homoj, kiuj instruas Esperanton, ne estas profesie kvalifikitaj, t.e. ili ne posedas pedagogian scion pri instruado kaj specife pri lingvoinstrua metodologio. Se apud tiuj mankoj aldoniĝas ankaŭ neadekvata regado de la lingvo kaj nur supraj kompreno de la gramatikaj reguloj, estas evidente, ke bonaj rezultoj en kursinstruado ne estas atingeblaj. Cetere, la profesiaj instruistoj kaj metodikistoj, kiuj verkas faklibrojn pri instrumentadoj, ne povas faciligi prezentadon de la temo de transitiveco, se ili mem pekas kontraŭ la reguloj. Fine, studentoj en Esperanto-kursoj de la Fako pri Generala kaj Aplika Lingvistiko de la Scienca Universitato "Loránd Eötvös" en Budapeŝto, en siaj publikigitaj laboraĵoj, atestas, ke transitiveco ne estas primajstrebla eĉ post tre intensa

metodologia traktado de Esperanto. Kaj ili diplomigis por instrui Esperanton!

2.3. Mankhavaj lerniloj

Kontribuas al nebona scio de la uzo de verboj en Esperanto ankaŭ neadekvata traktado de Esperanto en gramatikoj kaj vortaroj. Unue, malmultaj lernolibroj enhavas racian kaj detalan prezentadon de verba transitiveco. Plej ofte estas nur klarigo pri la maniero transitivity netransitivajn verbojn per aldono de la sufikso "-ig" kaj netransitivity transitivity verbojn per "-iĝ". Kelkfoje la sola indiko pri la transitiveco de verbo estas la traduk-ekvivalento en la etnolingvo de la lernanto. Problemo estiĝas, kiam samsignifa verbo en ambaŭ lingvoj ne havas la saman transitivecon. Lingvoinstruaj pedagogoj nomas tiun konflikton interfero, kaj ĝi estas la kaŭzo de pluraj lingvaj eraroj. Tamen, ne ĉiuj aŭtoroj de lernolibroj eĉ konscias pri la fenomeno, do ili ne atentigas lernantojn pri la diferencoj. Pluraj lernolibroj kaj gramatikaj kompendioj konsilas, ke, kaze de dubo pri la transitiveco de verbo, oni konsultu vortaron. Bedaŭrinde, ne ĉiuj vortaroj indikas la transitivecon de verboj; cetere estas malakordoj inter leksikografoj; plue, estas vortaroj, en kiuj kelkaj verboj estas signitaj kiel transitivity kaj ankaŭ netransitivity.

2.4. Malfacila lingvo

La kvara kaŭzo de malfacileco estas la lingvo mem. Esperanto ja estas facila lingvo, sed ĝi havas kelkajn malfacilajn gramatikajn. Unu el ili certe estas la transitiveco de verboj. Priskribaj gramatikoj, celantaj provizi precizajn regulojn por uzo de la lingvo, estas multe pli komplikaj ol didaktikaj gramatikoj, kies primara tasko estas simpligi la regulojn por ebligi praktikan kaj efikan instruadon. Same kiel malakordo karakterizas la laboron de leksikografoj, ĝi manifestiĝas ankaŭ en la komplikaj teoriaj klasifoj, kiujn gramatikistoj formulas por priskribi la verbosistemon de Esperanto. Tiel, krom transitivity kaj netransitivity kategorioj, estas ankaŭ la nocioj de transitivity verboj uzataj absolute, ambaŭrolantaj verboj, dudirektaj verboj, alternobjektaj verboj, ambiguaj verboj, la etimologia figuro kaj, fine, esceptoj klarigeblaj kiel rezulto de etnolingva influo.

Ankoraŭ ne ekzistas kontentiga respondo al la fundamenta demando de ĉiu lernanto kaj uzanto de Esperanto: kiel estas eble rekoni la naturon de ĉiu verbo? Esperanto havas markilojn por diferencigi la ĉefajn parolelementojn, kazojn de substantivoj kaj verbajn tensojn kaj modojn, sed mankas al ĝi markilo indikanta la transitivecon de verbaj radikoj. La du sufiksoj, "-ig" kaj "-iĝ", ne funkcias tiucele, ĉar ili estas uzeblaj en ĝusta maniero, nur se oni scias antaŭe, ĉu

la radikoj mem estas transitivity aŭ netransitivity.

Kelkaj gramatikistoj malkaŝe konfesas, ke transitiveco prezentas apartan malfacilecon. F. Baronnet en unu el siaj "Lingvaj Anguloj" klarigas, ke "estas neeble formuli ĝeneralan regulon por helpi la lernanton en la ĝusta sintaksa uzado de la verbaj formoj. PIV apogas tiun mornan konstataĵon per jenaj vortoj: "La klasifikado de verboj inter "transitivity" kaj "netransitivity" prezentas iajn malfacilaĵojn pro la elasteco de uzado de la akuzativo en nia lingvo" (pĝ. XIII). Sendube, oni pagas grandan prezon pro tiu gramatikajo, ĉar ĝi faras peniga la instruadon kaj malkuraĝigas lernadon de la lingvo. Por primajstri la uzon de transitivity kaj netransitivity verboj en Esperanto, estas necese parkeri multajn ekzemplojn, senĉese konsulti vortarojn en kazoj de necerteco, kaj ekzerci sin konstante, ĉar ĉiu nova verbo prezentas la saman problemon. Plua komplikajo estas la klarigo en PAG (§ 119), ke en Esperanto, kontraŭe al multaj lingvoj "unu verbo ne povas esti samtempe transitivity kaj netransitivity, konservante la saman sencon." Tio signifas, ke lernanto devas enkapigi ankaŭ la senc-nuancojn, kiuj diferencigas la transitivity disde la netransitivity uzo de verbo, kies formo restas sensanĝa. Al tiu malfacilaĵo aldoniĝas la jam menciita manko de akordo rilate transitivecon inter kelkaj Esperantaj verboj kaj samsignifaj etnolingvaj verboj. Laŭ didaktika vidpunkto, tio malhelpas, ke lernantoj faru pozitivan transferon de lernataĵoj.

3. Proponoj por solvi la problemon de transitiveco

Dum la jarlonga diskuto pri tiu ĉi gramatikajo sur la paĝoj de **Esperanto**, manifestiĝis jenaj kvar tendencoj: 1. rezignacio; 2. teoriumado; 3. tolerado de eraroj; 4. akcepto de la nocio de ambaŭtransitiveco. La unuaj du reagoj estas esence negativaj, ĉar en la pasinteco ili alportis nenion al la solvo de la problemoj. Male, starpunktoj 3 kaj 4 prezentas trarompon de nova maniero pensi pri transitiveco kun la celo elimini ties malfacilecon.

3.1. Rezignacio

Ĉe tiu ĉi tendenc-poluso troviĝas esprimoj de naiveco, negativismo kaj nenifarado. Ekzistas simpluloj, kiuj argumentas, ke vere ne estas problemoj! Ekzemple, unu asertas, ke, ĉar neniu el la reguloj de la Fundamenta Gramatiko tuŝas la temon de transitiveco, estas neniu motivo okupiĝi pri ĝi. Laŭ alia klarigo, ĉar troviĝas gramatikaj konstruoj ebligantaj uzon de la akuzativo anstataŭ prepozicio, la demando pri transitiveco fariĝas gramatika bagatelo. Ankoraŭ unu nerealeca vidpunkto volas

kredigi, ke nur malbone uzantoj de Esperanto ne scipovas ĝuste uzi verbojn en la lingvo. Dementas tiun falsajon la eraroj de t.n. bonaj aŭtoroj, akademianoj kaj metodikistoj pri instruado, kiuj stumblas same kiel ordinaj esperantistoj. Negativa estas ankaŭ la rezonado, ke Esperanto estas aposteriora lingvo, kiu ĉerpis sian leksikon el etnaj lingvoj, kaj pro tio oni devas akcepti la "mankhavaĵojn" trajtojn de tiuj lingvoj, eĉ se ili malfaciligas lernadon. Tamen, en la tendaro de la rezignaciuloj aŭdiĝas ankaŭ plendoj, ke ne estas facile dediĉi sin al intensa, daŭra kaj efika lernado de gramatikaj malfacilaĵoj en Esperanto, ĉar oni ne disponas la bezonatan didaktike uzeblan gramatikan lernilon. Tiuj, kiuj proponas publikigon de tia lernolibro, ja konscias, ke ne havas respondon la demando: "kiu verkos ĝin?"

3.2. Teoriumado

Inter partoprenintoj de la diskuto pri transitiveco estas homoj apartenantaj al la kategorio de kabinetaj gramatikistoj. Ili tre malofte publikigas beletrajn verkojn aŭ eĉ fakverkojn sur la tereno de sia propra profesio aŭ metio, sed okupiĝas primare pri gramatikaj demandoj, elcerbigante teoriojn pri vortformado kaj sintakso, inventante novajn terminojn kaj redifinante transitivecon. Iliaj novaj klasifoj de Esperantaj verboj baziĝas jen sur analizo de komplementoj, jen sur la semantika enhavo de verboj, jen sur la rilato inter subjekto kaj verbo. Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj. La novaj klasifoj de verboj ne ĉiam kongruas kun tradiciaj traktadoj, kaj oni ne povas facile vidi evidentajn avantaĝojn en la novaj kaj pli komplikaj grupigoj.

Unu el la teoriumuloj, skribante pri etnaj lingvoj, prezentis la nocion, ke "universala lingvo ne implicas universalan sistemon", do ne eblas aŭtomatigi transitivecon en Esperanto. Nu, se oni planas lingvon, oni ne faru tion laŭ la modelo de ekzistantaj lingvoj; ja estas pli racie plani ĝin, por ke ĝiaj gramatikaj estu facile, eĉ aŭtomate, trakteblaj. Eble la plej malpraktika teoria maniero proponita por determini transitivecon estas la semantika analizo de ĉiuj verboj. La malavantaĝo estas, ke ĝi ne estas rapida maniero, sed postulas multe da cerbumado por scii, ĉu verbo estas transitiva aŭ netransitiva. Tian analizon oni povas fari sidante en kabineta fotelo, ne kiam oni staras surpiede, parolante la lingvon.

Objektiva pritakso de la lingvouzo de esperantistoj dum pli ol unu jarcento, kaj analizo de la pretendoj kaj rezultoj de la metodologio pri instruado de Esperanto, evoluinta dum la sama periodo, indikas, ke la kontribuo de la teoriumuloj estis kaj estos senvalora. Kelkaj esperantistoj, reagante malfavore al la proponoj de la kabinetaj gramatikistoj, karakterizas la obskurajn kaj nekompreneblajn klarigojn kiel "tro

altnivelajn" kaj "pli akademian ol praktikajn", kaj ili akcentas, ke multe da homoj ne povas apliki la teoriojn en praktika maniero. Konklude, la ellaborado de pli kaj pli densa teoria fono por klarigi la fenomenon de transitiveco en Esperanto estas vana agado.

Inter la esperantistoj, kiuj pledas por facileco de Esperanto, estas Werner Bormann, kiu argumentas, ke uzantoj de la lingvo bezonas simplajn kaj rapide decideblajn regulojn. (Ĝuste tiu kriterio de facila apliko de reguloj malestas en la diskutoj de la teoriumuloj.) Bormann insistas, ke Esperanto povas konkuri kontraŭ etnolingvoj nur, se ĝi distancas de ili per la kvalito de facileco. Tamen, li pesimisme rimarkigas, ke la nuna evoluo de la lingvo ne iras en la direkto al facileco; male, pli komplikaj reguloj kaj pligrandiganta vortprovizo faras Esperanton pli malfacila de jaro al jaro. En la sekvaj sekcioj ni vidos, ke oni povas esti iom optimisma pro nova tendenco, kiu komencas disvolviĝi en la pensoj de esperantistoj okupiĝantaj pri la estonteco de Esperanto. Temas pri trarompo al nova maniero rigardi la rilaton inter la normlingva uzo de Esperanto kaj devia lingvouzo.

3.3. Tolero de subnorma lingvouzo: la demotika kaj la elita lingvaĵoj

Apogantoj de tolero de subnorma lingvouzo, nome permeseblaj devioj de la starigitaj gramatikaj reguloj, prezentas atestojn pruvantajn, ke ne ĉiuj lernantoj de Esperanto estas same kapablaj ĝuste apliki la gramatikajn regulojn. Sekve, ili parole kaj skribe uzas pli simplan, senbalastigitan formon de la lingvo. Laŭ modera, limigita vidpunkto de tolero, oni rigardas la subnorman nivelon de lingvouzo nur kiel provizoran stadion, kaj oni instigas uzantojn de la "primitiva jargono" aŭ "dialekto" al plua lernado por akiri pli profundan lingvoscion. Tamen, ne ĉiuj esperantistoj sentas la bezonon perfektigi sian scion de Esperanto. Multaj estas kontentaj, se ili sukcesas adekvate plenumi ĉiujn siajn dezirojn en Esperantujo, malgraŭ sia lama esprimkapablo. Rezultas el tio, ke la rudimenta lingvo de kolektantoj kaj kongresemuloj pli kaj pli disvastiĝas sur la teritorio de la Esperanta lingvokomunumo. Por diferencigi la "unugroŝan" Esperanton karakterizan de la unua kurso kaj la elementa lernolibro disde la literatura lingvo tute laŭregula kaj posedanta ampleksan vortprovizon, estas utile uzi la nomojn "demotika lingvaĵo" por la unua variaĵo kaj "elita lingvaĵo" por la normlingvo. Klarvidaj pensuloj konstatas, ke verkado de diklibraj komentarioj pri gramatikaj malfacilaĵoj en Esperanto apenaŭ nuligos persistajn trajtojn de la demotika lingvaĵo, kiu nuntempe fakte karakterizas la parolan lingvon kaj certgrade ankaŭ la skriban. Sekve, provizora tolero de devia lingvouzo devas transformiĝi al

akcepto, rezulte de nova interpreto de la koncepto de normlingvo. Tio povas okazi post modifado de gramatikaj reguloj, procedo, kiun ilustras la ebla traktado de transitiveco en la estonteco.

3.4. Solvo de la problemo: reviziado de la koncepto de transitiveco

Modifado de la gramatiko de Esperanto kun la celo forigi malfacilaĵojn estas farebla en du paŝoj: 1. simpligo laŭ tradicia vojo; 2. adopto de regulo eliminanta unutransitivecon de verboj.

3.4.1. Nestabileco kaj arbitreco de transitiveco

Laŭ la klasifo de verboj en **Plena Vortaro** (PV, 1934), tri kategorioj estas signifitaj per "tr" (transitivaj), "ntr" (netransitivaj) kaj "x" (verboj uzeblaj kaj transitive kaj netransitive). Tridek ses jarojn poste PIV arbitre forigis la "x"-signon, ĉar ĉefredaktoro G. Waringhien opiniis, ke "pli bone estas analizi ĉe ĉiu verbo, ĉu unu senco donas transitivan, alia netransitivan karakteron al la radikoj" (pĝ. XIII). Ĉi-rilate, unu el la teoriumuloj komentas, ke komparo inter signado de verboj en PV kaj PIV "postlasas la impreson, ke la transitivecon de la verboj oni ŝajnas determini per jetkuboj", dum alia gramatikisto provas klarigi la fenomenon de ŝanĝiĝo de transitiveco per la klarigo, ke "la nocio de transitiveco en la naciaj lingvoj, ekzemple en la franca, ne estas absoluta afero. Verboj antaŭe transitivaj estas hodiaŭ netransitivaj kaj kontraŭe". Estas rimarkinde, ke la vortaraj difinoj de "transitiva" kaj "netransitiva" ŝanĝiĝis inter la eldondatoj de PIV (1934) kaj PIV (1970) kun la rezulto, ke kelkaj verboj estis metitaj en alian kategorion de transitiveco! Cetere, eĉ nun pluraj verboj estas signifitaj en PIV per "tr" kaj ankaŭ "ntr".

En sia Esperanta-angla vortaro (1967) M. C. Butler donas al pluraj verboj tre larĝan uzeblecon rilate transitivecon; efektive, temas pri ambaŭroleco de la verboj. Li klarigas jene: "Ne estas regulo, ke certaj verboj devas aŭ ne devas sekvi rektan objekton. La plejmulto da "transitivaj" verboj povas esti uzataj elipse sen iu esprimita objekto. La plejmulto da objektoj povas esti anstataŭigitaj per prepozitivo, kaj kontraŭe. Kunteksto, klareco kaj la signifo de la radikoj estas la plej bona gvido." Kelkaj esperantistoj, opiniante, ke la signado de verboj per la "x" de PV estas utila, pledas, ke ĝi estu reenkondukita en leksikografiajn verkojn, por ke ĉiuj esperantistoj havu pli da libereco rilate la uzon de verboj.

3.4.2. Evoluo al ambaŭtransitiveco

La dua paŝo post agnosko de la demotika variaĵo de Esperanto kaj tolero de lingvaj devioj en ĝi, estas starigo de regulo permesanta, ke iu ajn verbo en Esperanto povas esti uzata transitive aŭ netransitive, se la frazo estas senchava. Por klarigi, kial oni ne devas ĉiam uzi la sufiksoidojn "-ig" kaj "-iĝ", oni citas la principon de sufiĉo kiel difinita en **Oficiala Gazeto** (majo 1913): "Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenebla el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa." Sekvas el tio, ke jenaj du frazoj estas akcepteblaj: 1. La akvo bolas; 2. Li bolas la akvon. Citinda estas ankaŭ klarigo pri transitiveco en PAG (§ 178, Rim. III, pĝ. 243): "La transitiva uzebleco de la verboj estas en E-o pli larĝa ol en la naciaj lingvoj ĝenerale: oni povas diri, ke ĉiu verbo povas esti uzata transitive, se la tiel formita esprimo povas havi sencon. Tio devenas de la 14-a regulo, ke ĉiu prepozicio estas anstataŭigebla per la akuzativa kazo. Escepto estas nur la prepozicioj demovaj (de, el)..." PAG malpermesas ankaŭ, ke oni uzu verbon transitive, se per tio oni ŝanĝus ĝian signifon; ekzemple, "bruli" en la frazo "bruli lignon" ne povas havi la sencon de "bruligi". Tamen, en la angla lingvo tia uzo de la verbo **to burn** ne kaŭzas problemon: **wood burns** (ligno brulas); **he burns wood** (li bruligas lignon).

Laŭ la 14-a regulo de la Fundamenta Gramatiko, se oni ne estas certa pri la specifa prepozicio, kiu devas esti uzata, oni povas uzi "je". Plue, estas eble anstataŭigi "je" per akuzativigo de la substantivo. Laŭ la observo de Alec Venture, jam estiĝis kutimo plivastigi tiun permeson, tiel ke en la nuntempa lingvouzo oni povas anstataŭigi preskaŭ ĉiun prepozicion per la akuzativo. Rezulte de tiu evoluo de pensado pri verba transitiveco en Esperanto, ŝajnas, ke ne plu valoras insisti pri rigidaj kategorioj de transitiveco kaj netransitiveco.

Por la estonteco ekzistas jenaj alternativoj. Se oni postulos, ke verboj estu klasifitaj laŭ la tradicia nocio de transitiveco, tiam daŭre regos tensio inter erarhava, subnorma lingvouzo kaj la elita lingvo, strikte konforma al komplikaj gramatikaj reguloj, kiujn relative malmultaj esperantistoj sukcesas perfekte posedi. Male, se oni adoptos liberalan sintenon pri gramatikaj demandoj, tiam estos eble simpligi la traktadon de transitiveco en Esperanto kaj akcepti la demotikan lingvajon, kiu jam nuntempe estas la interkomunikilo de granda parto de la Esperanta lingvokomunumo.

En septembro 1990

POEZIA VESPERO



La literaturo, la libroj estas la plej elokventa pruvo pri la ekzisto de la Lingvo Internacia. La libroj ligas nin kaj montras, ke ni la esperantistoj apartenas al socio, kiu kvankam ne granda, havas siajn kulturajn tradiciojn, siajn poetojn, verkistojn, tradukistojn. Tio estis la ĉefa motivo, kiu igis sofian E-Kulturdomon organizi la 8-an de majo 1991 vesperon dediĉitan al la Esperanta poeto kaj tradukisto Venelin Mitev.

La riĉa tradukista kreado de Venelin Mitev estis prezentita de la verkisto Julian Modest. Li emocie kaj detale parolis pri la vivovojo de Mitev, pri lia aktiva Esperanto-agado, pri liaj multnombraj poeziaj tradukoj. Nur dum kelkaj jaroj Venelin Mitev talente tradukis en Esperanton poemojn de pluraj elstaraj bulgaraj poetoj kiel Ĥristo Smirnenski, Ĥristo Radevski, Elisaveta Bagrjana,

Dora Gabe, Veselin Ĥanĉev, Damjan Damjanov, Stanka Penĉeva kaj aliaj.

Mitev estas unu el la malmultaj bulgaraj esperantistoj, kiuj tradukas poezion el Esperanto en bulgaran lingvon. Liaj belegaj bulgarlingvaj tradukoj de konataj Esperantaj poemoj, kiuj dum du jaroj aperis en revuo "Panorama Esperanto" montris al la bulgaraj legantoj la riĉecon kaj la originalecon de la Esperanta poezio.

Post la portreto, kiun faris Julian Modest, la geaktoroj Angelina Sotirova kaj Miĥail Ferdotov recitis poemojn de Venelin Mitev. Nevjana Krâsteva kaj Miĥail Ferdotov kantis la kanton de la teatra spektaklo "Venontjare denove kune", kies tekston de la kanto originale verkis Venelin Mitev.

Bulgara Esperanta Koruso same salutis V. Mitev per du kantoj. Je la nomo de la firmao "Pres-Esperanto" Maria Jankova donacis florbukedon al la poeto kaj

tradukisto, kiu estas prezidanto de la firmao "Pres-Esperanto" kaj unu el la plej aktivaj kunlaborantoj de la "Bulgara Esperantisto".

La ĉeestantoj, kiuj bone konas la poezian kreadon de V. Mitev, starigis multajn demandojn pri la krea laboro, pri la tradukoj. Venelin Mitev tralegis siajn novajn tradukojn, siajn bulgarlingvaj poemojn kaj eldiris interesajn pensojn pri la poezio kaj tradukarto.

Tiu ĉi neforgesebla emocia vespero ankoraŭfoje montris, ke malgraŭ la malfacilaj nunaj cirkonstancoj, la Esperanta poezio estas ne nur bezonata, sed el ĝi ni povas ĉerpi fortojn kaj esperon por nia Esperanta agado.

Georgi ILIEV



BELARTAJ FESTOJ

Internacia Literatura
Konkurso
"Atanas D. Atanasov -
ADA"

Fine de marto en Jambol okazis la dujara konferenco de Sekcio "Literaturo" ĉe BEA. Ĉeestis la vicprezidantoj de BEA Venelin Mitev kaj dr. sc. Kiril Velkov, estraranoj de BEA prof. Kiril Popov, Enjo Enev, Georgi Mihalkov, Ljubomir Trifonĉovski, esperantistoj el Sofio kaj regiono de Burgas, poetoj, verkistoj, estraranoj de la Sekcio.

Oni honoris la memoron de la forpasinta eksprezidanto de la sekcio Kunĉo Vălev.

Georgi Mihalkov, sekretario de la sekcio, resumis en sia raporto la altnivelan kulturan vivon de BEA sur ĉiuj kampoj: literaturo, muziko, kritiko, teatro. Al tiu laboro certe kontribuas la fakto, ke la estraro konsistas precipe el spertaj fakuloj.

La raporto rememorigis la plej gravajn momentojn en la agado de la sekcio: renkontiĝo de la E-verkistoj en Vraca en 1989, kiam la sekcio renaskiĝis; literatura konferenco en Ĥaskovo en 1990 pri temo: "La rolo de bulgaraj E-verkistoj kaj tradukistoj en la kultura vivo kaj renovigaj procesoj en BEA"; ŝumena kunsido enkadre de nacia E-kongreso, en kiu partoprenis pli ol 200 verkistoj, tradukistoj kaj kulturagantoj de BEA; konferenco en novembro 1990 en Burgas pri temo: "Rolo kaj signifo de la originala E-literaturo".

La raportanto faris kritikan analizon de bulgara originala E-literaturo, precipe de la enhavo de aperintaj verkoj. Li parolis ankaŭ pri la plej gravaj taskoj de la sekcio kaj ties membroj. Mihalkov menciis la nomojn de gajnintoj de premioj en naciaj kaj internaciaj konkursoj: Nikola Pilev, Penka Papazova, Venelin Mitev, Stefan Ĉirpanliev, Lili Sotirova, Dimităr Haĝiev, Nikolao Stranĝanski k.a.

Estrarano de BEA Ljubomir Trifonĉovski legis projekton de dujara laborplano de Sekcio "Literaturo", laŭ kiu en majo 1991 okazos konferenco en Burgas, en marto 1992 - konferenco en Ŝumen, en julio 1992 - internacia Forumo en Vraca.

Tiun laborplanon, buĝeton kaj planon por la krea laboro oni akceptis unuanime.

Enkadre de la konferenco la ĉeestantoj spektis teatraĵon "Enŝteliĝi en la koron" de Julian Modest (Georgi Mihalkov), plenumita de aktorinoj Angelina Sotirova kaj Nevjana Krăsteva.

Folkloro grupo el vilaĝo Tenevo salutis la konferencon per bulgaraj popolaj kantoj, tradukitaj en Esperanton de Nikolao Stranĝanski.

En la nomo de BEA kaj de Sekcio "Literaturo" G. Mihalkov salutis Stefan Ĉirpanliev okaze de ties 55-jara jubileo kaj 30-jara E-agado. Stefan Ĉirpanliev estas ne nur bona esperantisto, bulgara verkisto, sed ankaŭ sciencisto, kiu profunde studis la vivon kaj la agadon de la bulgara revoluciulo kaj verkisto Zafari Stojanov.

La konferencanoj elektis novan estraron de Sekcio "Literaturo" ĉe BEA. Ĝi havas la jenan konsiston: Georgi Mihalkov (prezidanto), Nikolao Stranĝanski (sekretario) kaj Ljubomir Trifonĉovski el Vraca, Nikola Pilev el Ĥaskovo kaj Penka Papazova el Jambol (membroj).

Post la konferenco okazis literatura vespero, en kiu siajn poemojn recitis Nikolao Stranĝanski, Penka Papazova, Nikola Pilev k.a.

Nikolao STRANĜANSKI

La 12-an de februaro 1992 estos la centjara datreveno de la eminenta bulgara esperantisto **Atanas D. Atanasov - ADA**, membro de la Akademio de Esperanto, aŭtoro de lernolibroj, esperantologiaj studoj, talenta tradukisto.

Okaze de tiu ĉi jubileo Bulgara Esperanto-Asocio kaj Sekcio "Literaturo" ĉe BEA anoncas **Literaturan Konkurson "Atanas Atanasov - ADA"**

Konkursaj ĝenroj:

I. Traduko el bulgara en Esperanton de mallonga rakonto.

II. Eseo pri esperantologia temo.

III. Eseo pri libera temo.

Estos aljuĝitaj premioj.

Kondiĉoj por partopreni la Konkurson:

1. La konkursaj verkoj ne devas esti partoprenintaj en aliaj konkursoj.

2. La verkoj devas ampleksi maksimume 10 paĝojn po 30 liniojn.

3. Oni akompanu la tradukojn kun la originala bulgarlingva rakonto.

4. Ĉiuj konkursaĵoj devas havi la titolon kaj pseŭdonimon de la aŭtoro. En fermita eta koverto estu la vera nomo kaj adreso de la aŭtoro. Oni skribu la titolon de la verko kaj la pseŭdonimon de la aŭtoro sur la granda koverto.

5. Oni sendu la verkojn en tri ekzempleroj ĝis la **31-a de decembro 1991** al adreso:

1303 Sofio,
bul. "Ĥristo Botev" 97,
Bulgara Esperanto-Asocio
- por la Literatura
Konkurso "ADA".

FACILE ESTAS KRITIKI , SED LABORI - Malfacile!

La 11-an de majo 1991 en urbo Kazanlâk okazis Nacia Junulara Esperanto-Konferenco. Ĝin partoprenis junaj esperantistoj el 16 urboj de Bulgario. Kolektiĝis la plej entuziasmaj kaj fidelaj al la movado aktivuloj. Ĝojigas la fakto, ke malgraŭ la malfacila ekonomia situacio reganta en nia lando, la Esperanto-fajreto en la junaj koroj ne estingiĝis.

Dum la Konferenco oni pridiskutis la

problemojn ligitajn kun la estonta aktivado de Bulgara Esperanto-Junularo: preparlaborojn kaj organizadon de la Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Vraca (1993) kaj elekton de nova estraro. La nuna prezidanto konigis al la ĉeestantoj la ĉefajn direktojn en la ĝisnuna laboro de BEJ. Evidentiĝis, ke por la pasinta mandato BEJ memstare organizis 11 naciajn junularajn aranĝojn.

XI.88
XII.88
XII.88
IV.89
VI.89
IX.89
XII.89
V.90
VI.90
VI.90
X.90

Pleven
Pisanica
Varna
Sofio
Primorsko
Pisanica
Pisanica
V. Târnovo
Primorsko
Ŝumen
Pisanica

Nacia konferenco pri la E-brigadoj
Nacia studenta renkontiĝo
Kristnaska junulara E-festo
Printempa junulara renkontiĝo
Unua somera junulara semajno
Tradicia BEJ-seminario
Nacia studenta renkontiĝo
Studenta renkontiĝo
Dua somera junulara semajno
Forumo de junaj kongresaj delegitoj
Tradicia BEJ-seminario

Samtempe aperis la oficiala junulara revuo "SALUTON", organo de BEJ.

Post longa diskuto pri la plua aktivado de BEJ estis elektita provizora estraro:

Ganka Stojanova - Trojan
Hasan Jakub - Omurtag

Mariana Ĥristova - Polski Trâmbeș
Pavel Grigorov - Sofio
Raja Androvska - Vraca
Simeon Georgiev - Kazanlâk

Sukcesojn al la novelektitaj estraranoj
Dimitar DIMITROV

Pli ol 90 esperantistoj en Kazanlâk

Nekredeble, pro la streĉa ekonomia situacio en Bulgario, sed la nacia aranĝo "Rozo - 91" altiris la 11-an kaj la 12-an de majo en urbo Kazanlâk pli ol 90 esperantistojn el la tuta lando. Ĝi okazis por dua fojo en Kazanlâk. Kuraĝigan tendencon montras la nombro de partoprenantoj. Pasintjare ili estis nur 30. Tion emfazis en sia parolo dum la solena vespero la prezidantino de la E-societo "Roza valo" - Kazanlâk, Svoboda Damjanova. Ŝi informis la publikon, ke dum la sekvontjara renkontiĝo "Rozo - 92" oni festos la 90-jariĝon de la loka E-societo.

En la arta programo partoprenis lernantoj el Kazanlâk, amatoraj artistoj ĉe Esperanto-societo "Verda Stelo" el Stara Zagora kaj junulara ensemblo por modernaj kaj

latinamerikaj dancoj ĉe Domo de fervojisto el Mezdra.

Enkadre de la renkontiĝo okazis Nacia Konferenco de Bulgara Esperanto-Junularo (BEM). Oni elektis novan provizoran estraron kaj disputis pri la preparo de la 49-a kongreso de TEJO, okazonta en 1993 en Vraca. La ĉeesto de la junularo bone efikis la etoson de la tuta aranĝo.

Malgraŭ la ŝanĝiĝema plua vetero la gastoj havis eblecon viziti la faman tracan tombejon, urban artan galerion, domojn-muzeojn de la famaj bulgaraj pentristoj Deĉko Uzunov kaj Nenko Balkanski.

Georgi KESARIJSKI

Instruprogramoj de BEA

UNUA GRADO

I. CELOJ

La instruado en unua grado celas konigi al la lernantoj la bazajn principojn de la lingvo, krei ĉe ili povon uzi elemente parole kaj skribe Esperanton. Ĝi celas montri al la lernantoj la avantaĝojn de Esperanto - ĝian riĉecon, elastecon, relativan facilecon, fari ilin konvinkitaj adeptoj de la internacia lingvo. La kurso skizos plej bazajn konojn pri la Esperanto-movado, ties kulturo, literaturo, servoj ktp. Ĉi tie oni akcentu la praktikajn eblecojn uzi la lingvon, kiel kroman motivigon por la lernantoj.

La lernantoj devas povi: legi voĉe la tekstojn, regule prononcante; kompreni parolon; rakonti koncize pri iu temo aŭ situacio; skribi korekte konatan tekston; konversacii je konata temo; legi kun vortaro originalan aŭ tradukitan tekston en Esperanto.

II. ENHAVO

A. Leksiko / Temaro

1. Hejmo, familio, vivmaniero, profesioj, libera tempo. Konatiĝo.
2. Naskiĝloko, vidindaĵoj. Geografiaj nocioj.
3. Vojaĝoj, ekskursoj, trafiko.
4. Bestoj, plantoj.
5. Homa korpo. Kuracado.
6. Sezonoj, kalendaro, horoj.
7. Socia vivo, karakteroj / Lerneja vivo, karakteroj.
8. Magazenoj.

B. Gramatiko

1. Alfabeto, prononco, akcento.
2. Substantivo, adjektivo - singularo kaj pluralo.
3. Verbo. Baza konjugacio. Modoj.
4. Difina artikolo.
5. Personaj pronomoj. Oni.
6. Posedaj pronomoj. Artikolo anstataŭ poseda pronomo.
7. Refleksivo.
8. Diferenco inter *esti* kaj *havi*.
9. Numeraloj. Elementaj matematikaj operacioj.
10. Gradoj de komparo.
11. Akuzativo: de rekta objekto, de direkto, de tempo.
12. Tabelvortoj.
13. Neado. Neaj korelativoj kiuj formas neado. Duobla neado.
14. Adverboj - primitivaj kaj derivitaj.
15. Konjunkcioj: *aŭ, ĉar, do, dum, ĝis, kaj, ke, kvankam, kvazaŭ, nek, nu, ol, por ke, sed, tamen*.
16. Prepozicioj: *al, anstataŭ, antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, dum, ekster, el, en, ĝis, inter, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, per, po, por, post, pri, pro, sen, sub, super, sur, tra*.
17. Afiksoj: *-ad, -aĵ, -an, -ar, -abl, -ec, -eg, -ej, -em, -et, -ig, -iĝ, -il, -in, -ind, -ist, -on, -uj, -ul; bo-, ek-, for-, ge-, mal-, re-*.
18. Vortfarado kaj vortkunmetado.

C. Historio, movado, literaturo.

1. La lingva problemo kaj la homaraj streboj solvi ĝin.
2. Zamenhof - vivo kaj agado. Kreo de Esperanto. Verkoj.

3. Unuaj esperantistoj. Unuaj societoj. Unua kongreso.

4. La internacia Esperanto-movado: UEA, TEJO; landaj asocioj; fakaj asocioj; Delgita Reto; Pasporta Servo.

III. EKZAMENO

Antaŭekzamena testo

Por esti allasita al ekzameno, la lernanto devas trapasi antaŭekzamenan teston, kiu daŭras 45 min, kaj havi ne pli ol 30% da eraroj en ĝi. La instruanto mem preparu la teston por ĉiu aparta ekzameno (vidu la specimenon).

Skriba ekzameno.

Ĝi daŭras du horojn, dum kiuj la lernantoj devas verki ĉirkaŭ 30-linian tekston, elektante temon el inter tri proponitaj. Eblas konsulti vortaron.

Parola ekzameno.

Ĝi konsistas el elementa konversacio, uzante la konatan temaron. Necesas kontroli la kapablon paroli, la bonan komprenon de la demandaj vortoj, la regulan uzon de la akuzativo kaj la afiksoj. Estu speciale atentata la prononco de la ekzamenato.

Rim.: La ekzameno en unua grado estas sen

* * *

notoj; en la atestilo oni skribas "*kun rezulto sukcesa*".

Specimena antaŭtesto

1. Skribu la korektan finaĵon:

Mi parolas kun la nov... koleginoj, kiuj kantas bel... .

En la apud... ĝardeno ili rtenkontiĝos kun Paŭlo, konstant... ien rapidanta.

Ĉiam, kiam Elena ekscias novaĵ... , ŝi kuras al sia amikino.

La leon... , reĝo de la bestoj, aperis majeste antaŭ ni.

2. Kompletigu per afiksoj:

Tiu libro estas leg...a.

Ni ĉiuj estas ...helpaj antaŭ la malbonvol...oj.

Miaj ...patroj manĝas en labor...a manĝ...o.

Nia amiko malbone agis kaj plor...is la knab...on.

La turistoj ...sciis pri la ĉefaj vid...aĵoj de la urbo.

Kiam ŝi ...parolis la knabon, li ruĝ...is.

3. Kompletigu per prepozicioj aŭ subjunkcioj:

Niaj gepatroj zorgas ... ni.

La gelernantoj venas vespere ... la oka.

La homoj ridas ... feliĉo.

Ni venas ... kurso ... Esperanto ... lerni ĝin.

Ni ne scios ... morgaŭ matene ... ni devos ŝanĝi la tagon de la ekskurso.

Silenton oni povas trovi ... la urboj.

4. Uzu la taŭgan demandvorton:

... iras la lernantoj? (antaŭ la domo)

... estas en la ĉambro? (tablo kaj libroj)

... la patro kaj la patrino lernas? (ne)

Sur ... sidas la instruisto? (sur seĝo)

Por ... estis la respondo? (por ŝi)

En ... domoj vi loĝas? (en malgrandaj)

... vi malfruiĝis? (ĉar mi longe dormis)

... oni respondis al la instruisto? (post lia demando)

... ili serĉas? (grandan hotelon)

... telerojn portis la kelnero? (grandajn)

5. Uzu korektan verbofinaĵon:

La gepatroj ĉiam volas ke ni multe lern...

Li konstante volas multe lern... .

Mia amiko petas ke mi ir... kant... kun li.

Mia amiko volas kant... kun mi.

La patro deziras ke lia infano manĝ... la kukon.

La patro deziras manĝ... la kukon.

La instruistoj instruas por ke la lernantoj lern... .

Specimenaj temoj por la skriba ekzameno:

1. Mia lasta feriado.

2. Interesa vespero.

3. Kial vi eklernis Esperanton?

Elin PELIN

FRATOJ

Patro Cirilo senmove kuŝas sur la lito en malluma angulo de larĝa ĉelo kaj apenaŭ spiras. En la nigrigita ikonostazo super lia kapo briletas sanktlampeto kaj ĝia pala lumo reĵetas sur la murojn malklarajn siluetojn.

Ĉe la mortangulo deĵoras fratoj Onufro kaj Ignaco.

Ili sidas unu kontraŭ la alia ĉe la tablo, apud la lito, silente legas la psalmaron antaŭ lumigita vakskandelo kaj de tempo al tempo el la nigra botelo enverŝas brandon en siajn glasetojn, kiuj staras antaŭ ili.

En la monaĥejo antaŭlonge ĉiuj endormiĝis. Akra vento muĝas ekstere, frapas je la fenestroj, enpenetras la ladajn fumtubojn de la brulanta malantaŭ la pordo hejtoforno kaj ekkantas strange: "Trankviliĝu, Sinjoro!"

Tiun ĉi misteran refrenon pormomente sufokas la dormemaj kaj fervoraj preĝoj de la patro Ignaco, kiujn li flustras per sia dika buŝo:

- Sinjoro, estu indulga, Sinjoro, estu indul... sin... dul... sin... dul... La monaĥo de tempo al tempo plilaŭtigas sian voĉon kaj ties sono disverŝiĝas tra la larĝa ĉambro kiel akra, ŝtona flustro, kiu rampas tra la grandaj ŝrankoj, frapiĝas je la kvar muroj, je la planko, je la fenestroj kaj enfalas la neklare lumantan sanktkandeleton, kiu tremas kaj klakas.

La eta korpo de maljuna patro Onufro, kaŝiĝinta en la vasta sutano, sidas senmove kaj malstreĉe sur la seĝo kiel saketo. Lia kapo pendas super la psalmaro, sed lia buŝo ne moviĝas kaj liaj okulharoj estas fermitaj.

La vento pli forte ekfrapis la fenestron kaj malgaje ekkantis en la hejtoforno per iaj infanvoĉoj, malproksimaj, kvazaŭ el la alia mondo: "Trankviliĝu Sinjoro!"

Patro Onufro levis time la kapon, ekrigardis patron Ignacon kaj ekdemandis:

- Kion vi diras?

- Ĉu vi dormas? - patro Ignaco elrigardis lin subbrove.

- Ŝajnis al mi, ke vi vokis min - frotis Onufro dormeme siajn okulojn.

- Vokas vin la aliaj kun la kornoj - alparolis lin patro Ignaco kaj li plu voĉlegis.

- Legu pli malliaŭte - rimarkigis patro Onufro, montrante per rigardo la malsanulon.

Ignaco ekrigardis severe kaj plu flustris:

- Aŭskultu, Ignaco, la animo de tiu homo agonias, kaj vi sence babilas super lia kapo - ripetis Onufro sian rimarkon.

- Se ĝi agonias, ĝi agoniu, mi legas por ties bono. Vi pensas, ke lia animo estas tiel pura, ĉu? Kaj ĝi estas kiel la via. Ni preĝu por ĝi - diris Ignaco malĝentile.

- Eh - enspiris Onufro, - granda avarulo li estis... Li pensis, ke ne mortos, sed jen la horo venis.

La vizaĝo de patro Onufro iĝis malgaja kaj enpena.

Patro Ignaco ĉesis flustri. Ekestis longdaŭra silento.

- Akvooon, akvon! - ekĝemis la malsanulo kiel el tombo kaj lia osteca mano ekpendis kiel hakita sur la lito.

La du monaĥoj ekstaris kaj reciproke sin rigardis, kvazaŭ demandante kion fari.

Sur la muro malantaŭ ili ekstaris ties du mallumaj siluetoj senmove, kvazaŭ atendus ordonojn.

Sinjoro - titolo de respekto al Dio

La sanktlampeto ektremis forte kaj tuj turniĝis reen, la ŝranko mistere grincis. La vento ekfrapis la fenestron kaj en la tuboj de hejtoforno denove ekkantis tiuj malproksimaj vagantaj infanvoĉoj. En la ĉelo iĝis timige. Kvazaŭ nevideblaj ŝtelistoj enirus kaj rapide traserĉus ĝin. Patro Ignaco metis fingron sur sian buŝon kaj mistere prononcis:

- La morto venis!
- Akvon! - ekĝemis ree la malsanulo kaj turnis sin al la fratoj. Sur lia vizaĝo, pala kaj senforta, estis observata tedo kaj peno paroli ankoraŭfoje. Lia blanka kiel neĝo barbo tremis, liaj buŝoj



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

moviĝis. Patro Ignaco donis al li glason da akvo. La malsanulo ekĝemis, turnis sian vizaĝon al la muro kaj ne deziris trinki.

- Li ne kutimas trinki akvon, la malriĉulō - ekridis sensone patro. Onufro.
- Ili ambaŭ sin klinis super la lito kaj longe aŭskultis.
- Li spiras - diris patro Ignaco.
- Estingiĝas jam lia vakskandelo - diris patro Onufro kaj aldiris: - tiu ĉi homo havis monon
- li trarigardis impone patron Ignacon.
- Li havis - konfirmis Ignaco enpensiĝinte.
- Onufro sin klinis ĝis lia orelo kaj diris mallaŭte:
- Ĉu ni ne povus priŝteli lin?

- Lasu lin morti - respondis patro Ignaco kaj metis fingron sur sian buŝon.

Ili ambaŭ sidiĝis ree ĉe la tablo. Patro Ignaco eklegis, patro Onufro apogis kapon sur la manojn kaj enpensiĝis.

En la ĉelo ree aŭdiĝis mistera flustro de legantaj buŝoj. La siluetoj ree petoleme balanciĝis sur la muroj. La vento ree ekkantis en la hejtoforno.

- Estas longa nokto, ha! - suspiris patro Onufro. - Kiel ni pasigos ĝin?

- Mi laciĝis! - patro Ignaco rigardis lin fermanta la psalmaron, kaj prenis la ludkartojn, kiuj kuŝis sur la tablo.

- Ĉu ni ludkartu?

- Ah! - plaŭdis Onufro manojn, - sed kial vi silentas?

Kaj lia vizaĝo ekridis.

Patro Ignaco enverŝis du glasojn da brando kaj ĵetis ludkartojn.

- Miksu!

Onufro kuspis la larĝajn manikojn de sia sutano kaj prenis la ludkartojn.

En la profunda silento de la ĉelo aŭdiĝis vetbatalaj murmuroj de la ludantoj kaj la frapo de la ludkartoj, kiuj falis klake sur la nudan tabulon, kiel grandaj, maloftaj gutoj de pluvo antaŭ ventego. La vento senĉese frapis pli insiste sur la fenestron. La nevideblaj vagantaj orfoĉoj ree ekkantis en la hejtoforno sian "Trankviliĝu, Sinjoro", kiu disvastiĝadis iom post iom, sufokiĝis kaj malaperis.

- Akvon, akvon! - ekĝemis per seka voĉo la mortanto, sed la fratoj, ebriaj pro la brando kaj enprofundiĝintaj en la kartludon, ne aŭdis lin.

- Akvon! - ripetis patro Cirilo kaj en lia voĉo sentiĝis la teruro de superhoma peno, venkita far la morto.

Lia blanka kapo sin levis de sur la kuseno kaj refalis kiel hakita.

- Li mortis! - diris la fratoj, lasis la ludkartojn kaj samtempe stariĝis kiel aŭtomatoj.

Ili aliris lin, diris ion al si flustre kaj enŝovis manojn sub la kusenon kaj sub la pajlomatracon, sur kiu kuŝis la mortinto. Ili eltiris unu multekostan sukcenkoloran cigaredingon.

- Ah! - ĝemis patro Onufro rigardante ĝin. - Ignaco, donu ĝin al mi!

- Ne, mi trovis ĝin.

- Vi ne estas fumanto, kiel mi.

- Ne gravas.

Kaj Ignaco enŝovis ĝin en la poŝon de sia vatita jako.

- Haltu! La monujon!

Ili ambaŭ proksimiĝis al la vakskandelo sur la tablo kaj emocie komencis serĉi en la ledmonujo, kiun ili eltiris el sub la kuseno.

- Unu, du, tri... dudek ormonerojn.

- Sekve, po dek...

- Ĉu ni plu serĉu?

- Sufiĉas!

Ili ambaŭ ree eksidis ĉe la tablo.

- Kia longa nokto! - oscedis Ignaco kaj krucsignis.

- Disdonu ludkartojn!

- Ĉu estas mia vico?

- Via...

La ludo rekomenciĝis.

Kaj pasis la nokto malluma, silentema kaj mistera. Pasis nesenteblo, senbrue kaj gracie. La ventego ekstere kvazaŭ ĉesis. Tra la ĉelfenestroj enrigardis la krepuska mateno kaj ĝi trovis la du fratojn, sin fordonintaj ankoraŭ al la ludo. La sanktlampeto super la kapo de la mortinto estis estingiĝinta.

Tradukis: Ilija KOLEV

Nikola PILEV

ONI DONACAS FLOROJN...

*Oni donacas florojn,
kiam hom' naskiĝas.
Oni donacas florojn,
kiam hom' edziĝas.
Oni donacas florojn,
kiam hom' forpasas.
(Eĉ pli multajn florojn
la venintoj lasas).
Oni donacas florojn,
sed la hom' dumvoje
ĝui tiujn florojn
havas ŝancon foje.*

KIO ESTAS LA AMO

*La amo estas birdo fajna
vundebla per rigardo ajna
Ĝi svingas ĉiam la flugilojn
en la ĉiel' de kvar pupiloj
Du koroj formas ĝian mondon
Se flugas ĝi distancon longan
la birdo lacon ne eltenos
se mankas spaco - ĝi ja svenos*



La telefono ŝtonas.

En kor' malpleno sonas.

Finrodas ies dentoj

la erojn de la sentoj.

Min telefon' ne vokas

kaj mi ĝin reciprokas.

Posthorizontas suno,

embuskas min mallumo.

Nun mi izole solas.

Kialoj min strangolas

kaj pendas mia memo

je arane'-fadeno.

La pensoj malkvietas

min tien-reen ĵetas

kaj tiom mi tro feblas,

ke falo eĉ ne eblas.

Ho, kiel hom' malfortas,

se flamon kor' ne portas,

se mutas voĉo ĉarma,

se mankas mano varma.

ĈIAM NOVAJ ESPERANTISTOJ

"Bonan tagon! Ĝis revido!"

Kaj post tio - verda rido.

Li kaj ŝi aktivas tamen

kaj l'aferon puŝas flamen.

KATINO - MALLABOREMULINO

Antaŭ multaj jaroj en eta kabano apud la rivero vivis la maljuna fiŝkaptisto avo Tasko. Krom fiŝojn li kaptadis ankaŭ mitulojn, helikojn kaj testudojn.

Ĉiun matenon la maljunulo prenis la fiŝhokon kaj ekiris fiŝkapti. En la kabano estis nur kelkaj testudoj. Pro tio li karesis la buntan katinon kaj diris al ĝi:

- Bone gardu ilin, Katino!

Kiam la avo foriris, la katino kuŝiĝis antaŭ la pordeto kun streĉitaj oreloj, kaj ĝiaj okuloj - ĉiam senĉese en la testudojn. Kuntiriĝintaj en siajn dikajn karapacojn, ili tiel profunde dormis, ke eĉ en ilian dormon ne venis la penso forkuri. Ekdormemis ankaŭ la Katino.

- Atendu - ĝi diris al si, - mi tiel faros, ke mi dormos, kaj samtempe mi gardos.

Ĝi prenis tabuleton, metis ĝin sur la testudojn kaj kuŝiĝis supren. Baldaŭ ĝi ekdormis. Kiam la testudoj vekigis, ili komprenis la ruzecon de la Katino kaj mallaŭte ekflustris:

- Ĝi komprenos, kiel oni povas kuŝi sur fremda dorso!

La testudoj eliris siajn mallongajn piedojn kaj ekpaŝis malrapide antaŭen. Ili eliris eksteren kaj sin direktis al la rivero, envadis la varmegan sablon, kaj poste ĵetis sin en la akvon. La tabuleto ekglitiĝis facile laŭ la kvietra rivera fluado. La Katino vekigis kaj timigite kurbigis sian dorson.

- Miaŭ, miaŭ... - ekmiaŭis ĝi, kaj la akvo portis ĝin pli kaj pli malsupren, kie la rivera bordo estis kovrita per surkreskintaj arbustaroj kaj estis ege terurige.

Kaŝita inter la salikoj kun fiŝhoko en la mano, avo Tasko aŭdis la malĝojan voĉon de Katino. Li ĉirkaŭrigardis kaj vidis en la rivero la tabuleton kaj la katinon sur ĝi. Ne estis tempo por pensi. Li refaldis pantalonujojn kaj envadis la malvarmetan akvon.

Li elportis la katinon sur la bordon, ĝi kun larmoplenaj okuloj rakontis al li ĉion.

-Eh, Katino, Katino! - ekspiris la maljunulo.
- Mallaboremulino estas vi, Katino, kaj vi meritis vian punon!

Sed li ne plu riproĉis ĝin. Ĝi estis lia sola amiko en la vivo. Li ĉirkaŭbrakis la katinon kaj karesis ĝin per sia kruda manplato.

Ivan JĖGLOV
Tradukis: Lilia KOLEVA

PRAKTIKAJ SCIINDAĴOJ

INSIGNOJ

La kolektado de insignoj ne estas pli malofta ol tiu de poŝtmarkoj, moneroj, poŝtkartoj k.a. Tiuj kolektantoj eĉ ne havas nomon, kiel la ceteraj: kiu kolektas poŝtmarkojn estas filatelisto, kiu kolektas monerojn estas numizmato, bankbiletojn - bonisto, poŝtkartojn - filokartisto, alumetetikadojn - filumenisto. Estas propono, ke la kolektantoj de insignoj estu nomataj faleristoj.

La faleristiko estas unu el la plej interesaj specoj de kolektado. Ĉiuj insignoj, ellaboritaj okaze de jubileo kaj aliaj okazoj respegulas la historion de la socia evoluo en iu ajn lando.

La insignoj estas kvalifikitaj laŭ ilia signifo:

Surbrustaj - oni enmanigas ilin pro grandaj meritoj en la laboro, soci-politika agado, sporto, turismo k.a.

Akademias - atestantaj, ke ties portantoj finstudis superajn, duonsuperajn, mezgradajn specialigitajn lernejojn.

Membrecaj - atestas la apartenon al diversaj politikaj, junularaj, sportaj, kulturklerigaj organizaĵoj, kreaĵoj kaj sindikataj asocioj, societoj, kluboj aŭ rondoj.

Suveniraj - ili estas dediĉataj al landoj, urboj, ekspozicioj, historiaj lokoj k.a.

Memorigaj - ili estas faritaj okaze de iu grava datreveno, okazintaĵo, je honoro de iu elstara aganto k.a.

La insignoj povas esti ellaborataj el plej malsamaj materialoj - metalo, plasto, ligno, led, ceramiko, teksaĵo. Plej ofte la insignoj estas farataj

el bronzo, kupro, platino, oro, arĝento, aluminio, diversaj alojoj k.a. Kompreneble por la kolektanto ne multe gravas el kia materialo estas farita la insigno, sed kia estas ĝia enhavo, pro kio oni faris ĝin kaj kies celon ĝi plenumas.

La insignoj estas ordigataj en specialajn tabuletojn, klasifikitajn laŭ temoj, enhavo kaj speco.

POŝTKARTOJ

La kolektado de poŝtkartoj-vidindaĵoj estas ankaŭ utila kaj amuza okupo. Oni povas kolekti poŝtkartojn entenantajn reproduktajn de famaj pentristoj, vidindaĵoj de loĝlokoj, historiaj lokoj k.a.

La poŝtkartoj estas tenataj en specialaj albumoj, en kovertoj kaj kartotekoj.

Tre utile estus, se la kolektanto priskribas la enhavon de la poŝtkartoj.

Kiel ĉe la ceteraj kolektadoj, samtiel ankaŭ ĉi tie la poŝtkartoj estas kolektataj per korespondado.

Ĉiu esperantisto posedas kvanton de ricevita poŝtkartoj. Necese estas, ke oni ordigu ilin bone, por ke ili estu utiligataj por propagando de Esperanto.

ALUMETAJ ETIKEDOJ

La etiketoj de la alumetaj skatoloj delonge estas speco de kolektado. En la lastaj jaroj, en Bulgario kaj en aliaj landoj,

la alumetetikadoj fariĝis pli variaj kaj riĉenhavaj. Ili respegulas la soci-politikan vivon en la lando, reklamas varojn kaj okazintaĵojn, estas dediĉataj al memorigaj datoj k.a.

La preparo de la etiketoj por kolektado similas al tiu de la poŝtmarkoj. Por ke oni apartigu la etiketon de la skatolo ĝi devas esti trempata en akvo, kiu havas ĉambran temperaturon. Se la akvo estas varma, estas risko, ke la desegnaĵo de la etiketo povas difektiĝi.

Post kiam la etiketo estas apartigita de la skatolo, ĝi devas esti sekigita.

Oni ne devas preni alumetskatojn, kiuj estas jetitaj surstrate. Tio estas danĝera por la sano. Nun en la specialigitaj magazenoj estas vendataj ankaŭ alumetaj etiketoj.

La alumetetikadojn oni ordigas kaj konservas samkiel la poŝtmarkoj.

Ĉiu esperantisto devas bone kaj estetike ordigi siajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn, insignojn, alumetetikadojn, monerojn k.a. objektojn, kiujn li ricevas per Esperanta korespondado.

Tiujn kolektajn ni nepre devas montri al la gastoj, kiuj vizitas nian familion. Tio estas interesa kaj ŝatinda okupo. Ĝi donas eblecon al ni sen altrudo rakonti multon pri nia Esperanta aktivado. Estus tre bone, se ni organizus ankaŭ ekspoziciojn el la Esperanto-kolektaĵoj. Per tio ni tre konkrete kaj konvinke informus pri Esperanto kaj propagandus nian ideon - la esperantismo.

Nikola NIKOLOV

Esperantistino - bioenergoterapeŭto

Jeĉka Pavlova estas konata nomo el la aktivularo de nia E-movado. Estinte estrino de E-societo "Espero" - kvartalo Nadeĵda en Sofio, la societo viciĝis inter la unuajn E-societojn en la ĉefurbo. Ne malmultaj homoj konas ŝiajn bonajn kvalitojn. Ankaŭ ŝiaj filoj estas esperantistoj. Sed mi ne deziras rakonti al vi pri ŝiaj meritoj sur la Esperanto-kampo.

Kie laboras nun la esperantistino, vickuracistino Jeĉka Pavlova? Oni povas vidi malgrandan ŝildon sur la pordo de kabineto n-ro 2 en polikliniko de fervojista malsanulejo: "Bioenergoterapeŭto Jeĉka Pavlova".

Kio okazis? Antaŭ pli ol dek jaroj malsaniĝis ŝia edzo. Oni lin operaciis. Li havis grandajn dolorojn. La kompatema edzino hazarde metis sian manon sur la bandaĝitan vundon kaj la viro iel trankviliĝis. La vizito finiĝis. J. Pavlova levis sian manon kaj la viro ekkriis: "Metu ĝin denove!" Estis nur 1979 - jaro, dum kiu en nia lando ankoraŭ oni ne parolis pri bioenergio.

Dum la sekva vizito la edzo de Jeĉka Pavlova petis, ke ŝi metu sian manon sur la kapon de apude kuŝanta malsanulo. Ŝi, kvankam sendezire, faris tion kaj la homo ekridis, ĉar liaj doloroj ĉesis. Dum la sekva vizito, kiam Jeĉka eniris malsanulejan ĉambron, la sama malsanulo ekkriis: "Suneto mia, venu al mi, mi petas vin".

Foje post fervojista akcidento Jeĉka Pavlova metis intence siajn du manojn ambaŭflanken de la vundita kruro kaj la suferantino tuj ĉesis kribi. Ĉe iu vojkruciĝo aŭto de urĝa medicina helpo ekskuiĝis, Jeĉka nevole levis siajn manojn kaj la vunditino denove ekkriis. La vickuracistinon preskaŭ konsternis la ebleco de ŝiaj manoj.

Poste... poste sekvis multaj similaj okazaĵoj. Jaroj pasis. La filoj elkreskis. Pli kaj pli grandiĝis la nombro de tiuj, kiuj trovis savon de siaj doloroj. Ŝin petis eĉ kolegoj kuracistoj, hospitalaj flegistinoj. Jeĉka Pavlova helpis al ĉiuj. Komence ŝi intence provis la fortojn de siaj manoj kaj iom post iom ŝi mem konvinkiĝis, ke ŝi vere povas helpi al malsanuloj. Tamen ŝi mem ne estis certa ĝis kiu grado etendiĝas ŝia bioenergio, kia estas ĝia forto kaj kapablo. Jeĉka deziris sciencan esploron de sia kapableco kuraci la homojn ne nur kiel vickuracisto, sed ankaŭ kiel bioenergoterapeŭto kaj ŝi decidis sendi specialan petskribon pri tio al la Ministerio pri Sanprotektado. Oni ŝin direktis al urbo Pleven, kie ekzistas explorebleco por tio.

Ricevinte oficialan atestilon, Jeĉka Pavlova turnis tre seriozan atenton al sia nova laboro. Ŝi legis kaj plu legas multajn specialajn librojn, ekmembris en la societo de bioenergoterapeŭtoj "Psikotronika". Ĉiu paciento venas al ŝi kun sia

kuracista diagnozo aŭ sen tia, kun esploraj rezultoj, aŭ sen tiaj. Ŝi, kiel medicina subkuracisto, jam havas rajton senĉese observi kaj registri la rezultojn. Kelkiam ŝi konsultas specialistojn kuracistojn, ekzemple kirurgon, neŭrologon, otolaringologon ktp. Se necesas, ŝi sendas la malsanulon en laboratorion, por specialaj esploroj.

Antaŭ ol ricevi sian oficialan atestilon, Jeĉka helpis ankaŭ min. Ĉe hazarda, neordinara kliniĝo min kaptis akra doloro en la malsupra parto de la dorso. Post du manipuladoj miaj doloroj malpliigis kaj post kvin mi jam povis denove moviĝi libere. Ŝi metis siajn manojn sur la malsanan lokon por kelka tempo, poste ŝi ilin ekmovis preter mia korpo supren, malsupren kaj reen. Ŝiaj manoj estis preskaŭ malvarmetaj, sed mi sentis agrablan varmeton. Poste, kiam la manoj moviĝis proksime al mia korpo, ŝajnis al mi, ke min ĉirkaŭas ia pli densa moviĝanta aero.

Dum la manipuladoj mi komprenis, ke ne al ĉiu homo ŝi povas efiki per siaj manoj. Iam, kvankam tre rare, aperas ia netoleremo, ia malkonveno inter ŝi kaj la paciento. Sed ĉiam, kiam ŝiaj manoj ektuŝas la pacieron, ŝi kvazaŭ lin ekamas. Kaj jen interesa fakto - multaj pacientoj jam diris al ŝi, ke ili ŝin sentas proksima kaj deziras konfidi eĉ siajn plej grandajn intimajn. Evidente dum la manipuladoj rolon ludas ne nur la eligita bioenergio, sed ankaŭ la psika stato de bioenergoterapeŭto kaj paciento.

Ne, mi ne devas rakonti pri diversaj okazaĵoj, ĉar vickuracistino bioenergoterapeŭto Jeĉka Pavlova estas en la komenco de tiu sia laboro. Ĝis nun ŝi efikis al ĉiuj okazaĵoj. Pli kaj pli larĝiĝas la diapazono de la malsanoj, kiuj malaperas sub ŝiaj manoj. Ŝi tolereme, zorge ekzamenas ilian forton.

Jeĉka Pavlova jam havas rajton eklabori por sia propra firmao Jeat-79 ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande.

Ĉiam eĉ inter niaj prapraantaŭuloj troviĝis diversaj popolaj kuracistoj. Nun venas novaj bioenergoterapeŭtoj. Iuj el ili povas precize diagnozi eĉ de distanco. Jeĉka jam efikis al malsanuloj eĉ per fotografaĵo, per telefona interparolo. Evidentiĝis, ke la homaj kapabloj estas neimageble grandaj.

Al la esperantistino bioenergoterapeŭto Jeĉka Pavlova ni deziras ĉiam pli grandajn sukcesojn. Ni esperu, ke la medicino ekmarŝos pli kaj pli grandskale man' en mane kun la evoluanta bioenergoterapeŭtiko.

Maria ANGELOVA

KIEL ESPERANTO ESTAS INSTRUATA EN HUNGARIO?

- *Bonvolu vin prezenti, sinjorino?*

- Mi nomiĝas Katalin Smideliusz kaj laŭprofesie mi estas instruanto en altlernejo. Ĝi situas en Szombathely, okcidenta Hungario, kaj estas frekventata de 18-23-jaraj gestudentoj, kiuj jam trapasis la abiturientan ekzamenon. En la kvarjara studado ili fariĝas diplomitaj instruistoj por ĝeneralaj lernejoj, popolklerigistoj aŭ bibliotekistoj. Ĉiu studento havas du fakojn, la plej kapablaj rajtas elekti en la tria jaro ankaŭ unu plian fakon. Mia altlernejo havas 1600 tagajn studentojn, sed paralele funkcias ankaŭ koresponda edukado. Nun estas periodo de rapida ŝanĝo, tial la estraro pretas subteni ĉian racian kaj praktikan planon.

- *Ĉu tio koncernas ankaŭ la internacian lingvon?*

- La politika ŝanĝo kaŭzis veran eksplodon en la lingvoinstruado. Ĝis antaŭ du jaroj la studentaro en la unuaj du jaroj devige lernis la rusan lingvon, kaj funkciis nur malmultaj lingvokursoj pri la aliaj lingvoj. Jam tiam mi instruis Esperanton al interesiĝantoj. Depost la reformoj la studentoj rajtas elekti inter dek lingvoj, kaj post kvarsemestra studado ili devas ekzameniĝi pri la elektita lingvo. Esperanto egalrangas kun la aliaj lingvoj. Laŭ la intereso de la studentoj ĝi okupas nun la kvinan lokon post la germana, angla, itala kaj latina, kiu estas deviga por historiistoj.

- *Kiel vi provas entuziasmigi viajn studentojn por Esperanto?*

- Mia celo estas ne nur instrui la lingvon. Jam de la komenco mi klopodas eksentigi al la kursanoj la esencon de nia movado kaj ekflarigi la esperantistecon. Bone efikas rakontoj pri mia propra sperto, ekzemple fruaj

korespondkontaktoj, renkontiĝoj kun esperantistoj, revuoj kaj ekspozicioj.

- *Ĉu vi alfrontas ankaŭ kritikojn?*

- Mi spertis, ke miaj studentoj ofte fieras pri sia esperantisteco kaj la aliaj ne nur toleras tion, sed ankaŭ interesiĝas pri nia agado. Aliflanke la fakto, ke oni povas instrui la lingvon sen iu ajn speciala edukiteco ŝajnigas kelkfoje nian lingvon kiel iun ne tre seriozan aferon.

- *Kvankam ekzistas Esperanto-fako en la budapeŝta universitato ELTE ekde 1966?*

- Bedaŭrinde nur malmultaj diplomigintoj en ELTE fariĝas instruistoj pri la lingvo. Ĝis nun la diplomo estas "nur" prelegista kaj ne instruista. Kaj nur en ekstremaj kazoj oni dungigis en ĝenerala lernejo kun universitata diplomo. Por tia lernejo nia altlernejo edukas la instruistojn.

- *Kiom da studentoj vi en Szombathely havas kaj kion ili konkrete lernas?*

- La E-fako ĉe ni funkcias ekde la studojaro 1990/91, en kiu mi havas 70 gestudentojn, kiuj studas Esperanton kiel devige elekteblan fremdan lingvon. Kadre de la kvinsemestra edukado la studentoj okupiĝas pri praktika kaj priskriba gramatiko, literaturo, interlingvistiko, movadhistorio kaj metodologio de la lingvoekzercado.

Nia plej celo estas, ke la studentoj supergrade regu la lingvon kaj tre bone konu la metodikon de la lingvoinstruado. Por tiu celo ni funkciigos infangrupon, kie ili unue nur observas la instruadon, sed poste kun respondeco partoprenos la laborojn, gvidos studhorojn.

Por akiri sperton pri la plenkreskul-instruado ili havas praktikon ankaŭ en la altlernejo instruante studentan grupon. Post la fino de la studado ili ŝtate ekzameniĝos kaj iĝos oficiale instruistoj en ĝenerala lernejo pri Esperanta lingvo kaj literaturo. Estus bone jam vidi la unuan tian diplomon!

- Kiel vi venis al Esperanto?

-Meze de la sepdekaj jaroj mi esperantistiĝis ĉe Blazio Vaha en nia altlernejo. Pro iuj problemoj mi ĉesigis la E-studojn, sed mi sciis, ke mi iam ellernos, eĉ instruos la lingvon. Unue mi aŭtodidakte lernis, poste akiris la movadan C-diplomon pri instruado. Pasintan jaron mi finis la studojn en la E-fako de ELTE en Budapeŝto. Antaŭ la diplomiĝo mi havis la eblecon staĝi en KCE (Svisio) kaj tiuj du mjonatoj forte difinis mian pluan taskon. Mi multon lernis de s-ro Claude Gacond, sukcese metis la pedagogi-metodikan ekzamenon de ILEI/UEA ĉe s-ino Irena Szanser kaj trovis multe da amikoj el la tuta mondo, sen kies amikeco kaj instigo mi kelkfoje ne plu havus forton daŭrigi la jam komencitan aferon.

- Kian helpon vi bonvenigus por la estonteco?

- Nia fako absolute ne disponas pri mono,

eĉ la poŝtokostoj estas ege limigitaj. Por instrui ni nepre bezonus librojn, por ke ni ne nur lernu pri la originalaj verkoj de la Esperanto-literaturo, sed ankaŭ havu la eblecojn legi, trastudi ilin. Nia adreso estas: K. Smideliusz, BDTF, Pf. 170, Szabadsag ter 4, H-9701 Szombathely. Signifan librodonacon ni ricevis de la landa asocio, sed temis pri la novaj nun aĉeteblaj libroj, mankas la malnovaj. Eĉ uzitaj libroj estus bonvenaj por nia nun kreskanta biblioteko. Ĉefe interesus nin lernolibroj uzataj en diversaj landoj por studi ilian metodikan strukturon, vortostokon ktp. Ni volonte akceptus ankaŭ ekzemplerojn de gravaj E-revuoj por esti informitaj pri iliaj agokampo kaj movadaj aferoj. Tre valora estis ankaŭ vizito de s-ro Carlevaro el Svislando, kiu multe kontribuis al la decido de nia altlerneja estraro rilate al Esperanto-instruado.

Estus ankaŭ bone, se miaj gestudentoj, same kiel mi en KCE, havus la eblecon ie eksterlande ekflari ian esperantistan etoson. Ili kapablu helpi en instruado, zorgi pri infanoj, labori per komputiloj, katalogi libron, multloke utili per Esperanto. Kial ne?

Walter KLAG,
Aŭstrio

Kiel studi en San Marino?

Ĉu vi konas la eblecojn pri studado per la Internacia Lingvo en San Marino? En San Marino funkcias Akademio Internacia de Sciencoj (AIS). Ĝia iniciatinto kaj la nuna rektoro estas Prof. D-ro Helmar Frank.

Kiel funkcias la Akademio?

Ĝi okazigas akademiajn kursojn en San Marino kaj ankaŭ en aliaj lokoj. Per tiuj kursoj eblas internaciigi la diplomon, kiun vi akiras en via lando. Post kiam vi finis la kursojn kaj sukcesis en la ekzamenoj vi posedas internacian diplomon de la Akademio. La traduko de vialanda diplomo al la internacia okazas laŭ severaj reguloj de la adoptiga procezo, kiu diferencas de fako al fako. La studobjektoj, kiujn vi studis per via diplomo, devas esti kompletigitaj per la partopreno en specialigitaj kursoj de AIS.

Havante jam diplomon vi povas informiĝi ĉe AIS, kiujn kursojn vi devus kromsekvi por akiro de la internacia diplomo. La studado en San Marino okazas per studunuoj. Unu studunuoj enhavas minimume 8 horojn. Ĉe AIS vi devas partopreni en almenaŭ 3 studunuoj. La aliajn vi povas akiri ekster AIS ĉe aliaj fakultatoj.

Por la ekzameno necesas verki disertacion en la gepatra kaj la internacia lingvoj.

Ciu kurso, kiun oni volas sekvi ĉe AIS, kostas 30 germanajn markojn. (Nepagipovaj landoj ricevas rabaton.) Ĝenerala partoprenkotizo por kursaro estas 30 germanaj markoj. Al tiuj kostoj aldoniĝas ankaŭ la restadkostoj en la hoteloj de

San Marino, meze 50 germanaj markoj po tage.

Aparte interese estas, ke en San Marino eblas akiri internacian diplomon ankaŭ tiuj homoj kiuj nur finis mezan lernejon. Se ilia edukiĝo ampleksis 12-13 jarojn, ili povas kandidati por bakalaŭreca diplomo. Tio estas la baza diplomo, simila al tiu, kiun oni en naciaj edukistemoj ricevas post dujara studo en altlernejoj. Tiu diplomo povus esti interesa por tiuj homoj, kiuj ne sukcesis finstudi la fakultaton, en kiu ili komencis siajn studojn kaj kiuj nun serĉas diplomon por la propra enposteniĝo.

Por akiri la diplomon bakalaŭreco, necesas entute sekvi kursojn en amplekso de 30 studunuoj (tio estas 240-450 studhoroj). Kiel parto el tiuj studhoroj estas validaj tiuj kursoj, kiujn vi studis komence de via studkariero en la nacia fakultato. Eĉ se vi ne finstudis la fakultaton, tamen, vi posedas vian studlibreton, en kiu kelkaj fakoj estis notitaj kiel validaj. Per AIS vi povas aktualigi ilian valoron.

La alian parton de la mankantaj studhoroj vi devas mem akiri ĉe la internaciaj profesoroj en San Marino.

La venonta sesio de Akademio Internacia okazos fine de aŭgusto k.j. en San Marino.

Aparte interese estas, ke per la studado en San Marino internaciajn diplomojn povas akiri ankaŭ neesperantistoj.

S.ŜTIMEC
El "Tempo", 1/1991

NOVAJ E-LIBROJ

MEDITAĴOJ, Johano Besado (Kubo), kun dediĉo kaj antaŭparolo de la aŭtoro, Esperanto-Centro Paderborno, Germanio, 32 p. broŝurita, prezo ne indikita, sen ilustraĵoj, unua eldono 1990, formato A 5, sen ISBN.

La verko enhavas 350 unu- ĝis trilineajn "pensojn", el kiuj kelkaj estas rimformaj. Laŭ la antaŭparolo de la aŭtoro ili ne transdonu saĝecon aŭ kleracon, sed kolektu la diversajn nuancojn de la ĉiutaga vivo. Tio estas ankaŭ mia impresoj. Jen kelkaj ekzemploj:

- En silenta arbaro nur mutuloj trovas bruon.
- Post granda peno, pli granda beno.
- Sen roso ne estas rozoj.

La libreto povas esti leginda por homoj, kiuj ŝatas tian literaturon.

MOZELA VOJAĜO PRO AMOAFLIKTO, Rudolf G. Binding, tradukita el la germana de s-ino Elfriede Krause, kun listo de propraj nomoj (esperantaj kaj germanaj versioj), Esperanto-Centro Paderborno, Germanio, 24 p., broŝurita, prezo ne indikita, sen ilustraĵoj, unua eldono 1991, formato A 5, ISBN 3-922570-69-0.

Tio estas unu el la plej konataj verkoj de la germano Rudolf G(eorg) Binding (1867-1938), kiu aperis en 1932. Pro tiu kaj aliaj noveloj Binding tre populariĝis en la 1920-aj kaj 30-aj jaroj en Germanujo.

Vojaĝanto tra la Mosel-regiono renkontas virinon, kiu evidente venas el la revoj: Perfekta sinjorino kun perfekta dentaro; ciganino, sed ne aspektas tiel; iel vireca; eĉ iom malgranda monstro; ŝajne riĉa, ĉar ŝi loĝas en luksaj hoteloj kaj posedas aŭton; portas nenian ornamaĵojn aŭ akcesoraĵojn. Same ideale priskribiĝas la Mozela vino kaj pejzaĝo.

La traduko estas tre bona. Enhave la verketo ne kontentigis min, ĉefe pro la tro naiva romantikismo.

LA ANALIZA SKOLO ANTAŬ LA MALOVECA TRIBUNALO, eldonita de Hermano Bermanno, Esperanto-Centro Paderborno, Germanio, 36 p., broŝurita, prezo ne indikita, sen ilustraĵoj, unua eldono 1991, formato A 5, sen ISBN.

Temas pri tri leteroj de Miroslav Malovec kaj la respondoj de Rikardo Ŝulco. En la apendico aperas traktado pri la uzo de la adverboj hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ.


La opinio de Ŝulco certe estas konata en Esperantio. Li defendas "altan nivelon de la lingvo" uzante "estas ebla" anstataŭ "eblas", "estas sendinta" anstataŭ "sendis" ktp. Li celas "ekkonigi al esperantistoj, kio estas la ĝusta Esperanto". Mi samopiniis kun Malovec, ke "nian lingvon povas unuecigi nur utila laboro por la interkompreniĝo de la nacioj pri utilaj aferoj, ne kvereloj pri banalaĵoj". La "skisma stato de Esperanto", pri kiu parolas Ŝulco, laŭ mi estas ĉefe en la kapoj de unuopaj teoriemuloj, kiuj ne en la ĉiutaga vivo uzas la lingvon, sed ŝatas sursceniĝi (pardonu: surscenejiĝi) logikajn ludojn. Kutime la parolanto de Esperanto havas aliajn problemojn.

Sekvenda ekzemplo

En n-ro 1 (100) por januaro kaj februaro 1991 de la revuo "La Espero el Koreio", eldonata en Korea Respubliko, sub titolo "Esperanto en lernolibro de elementa lernejo" estas publikigita E-traduko de la tuta teksto de leciono 23 en la lernolibro por sesa klaso de la elementa lernejo, eldonita de la Ministerio pri Edukaj Aferoj, titolita "Ni unuigu la mondon", en kiu estas prezentita la Internacia Lingvo Esperanto. En la leciono en tre konvena stilo por sesklasanoj oni rakontas kiumaniere naskiĝis la ideo pri la kreo de komuna lingvo, kiu helpu por amikiĝo inter la popoloj. La leciono finiĝas per la vortoj: "La amo de Zamenhof al la homaro por unuigi la mondon eterne restos viva en la mondo".

La leciono, kiu konsistas el ĉirkaŭ 410 vortoj laŭ la E-traduko, havas ununuran difekton, ke en ĝi mankas informo pri la esenco kaj la strukturo de la lingvo. Malgraŭ tio ĝi certe kontribuas por la konigo de Esperanto al la junaj generacioj kaj eble servas kiel stimulo por ĝia lernado.

La inkludo de leciono pri Esperanto en lernolibron de la elementa lernejo estas sendube granda konkero por la E-movado en Korea Respubliko kaj estas ekzemplo, sekvenda fare de la aliaj landoj, inkluzive la nian. Bulgara Esperanto-Asocio devus nepre profiti tiun ĉi precedencon (al mi ne estas konata alia simila okazo) por prezenti proponon al la Ministerio pri Klerigado pri inkludo de leciono pri Esperanto en la lernolibron por la respektiva klaso. Nun la momento por prezento de tia propono estas tre oportuna, ĉar antaŭstaras relaborado de vico da lernolibroj. Ĝis la eldono de novaj lernolibroj tia leciono povus esti inkludita rezulte de speciala instrukcio de la Ministerio pri Klerigado.



Deziras korespondi

BRAZILIO

SAULO ZACARIAS SARAIVA DA SILVA - Cx Postal 385, Juiz de Fora 36001, MG - kun ĉi pri ĉi.

SEBASTIAO PEREIRA - Cx Postal, 1752, 50001 Recife/PE. - deziras interŝanĝi kun la tuta mondo Esperantaĵojn (pm, poŝtstampojn, unutagajn kovertojn).

BULGARIO

ANELIA ĈUTURKOVA (22-jara instruistino) - 7200 Razgrad, ul. "D. Deĉev" 8, bl. Bor, ap. 7 - kun ĉi pri ĉi.

VESELINA ILIEVA (43-jara flegistino, fraulino) - 7015 Ruse, ĵ.k. "Druĵba" 3, bl. 10, vñ. J, pk. 18 - kun ĉi pri ĉi.

POLLANDO

mgr KAZIMIERZ MALEK (juristo kaj instruisto) - PL-58-105 Swidnica Sl., ul. Dabrowskiego 79/2 - kun ĉi pri ĉi.

esperantistinoj el Bulgario pri ĉi.

BOHDAN WASKIALLO (63-jara) - PL-54-436 Wroclaw, ul. Wojrowicka 48/27 - kun ĉi pri arto, fotado, turismo.

SUVETUNIO

ANDRES AITSEN (16-jara) - Outokumpu str. 19-160, SU-202020 Kohtla-Järve 8, Estonio - kun ĉi pri matematiko, fiziko, kemio, astronomio, komputado, lingvoj, historio de orientaj landoj, wu-shu.

12-16-jaraj estonaj gelernantoj dez.kor. tutmonde pri diversaj temoj, interŝanĝas bk, kalendaretojn ktp:

1) Marjamaa Keskikool, SU-203521 Marjamaa, Estonio

2) SU-200029 Tallinn, 44 Keskikool, Esperanto-klasoj, Estonio

3) Esperanto-rondo, SU-203040 Kose, Kose Keskikool, Estonio

4) SU-203469 Kaisma, Parnumaa, Kergu 9-kl.Kool, Estonio

OLGA BORZOVA (27-jara laboristino) - SU-123585 Moskvo, ul. Gen.Glagoleva, d.30, k.1, kv.29 - kun ĉi pri kuirarto, kino, turismo.

JUBILEO DE "JUGOSLAVIA FERVOJISTO"

Dum la regula jarkunveno de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE) en Ilidža (apud Sarajevo) oni celebris ankaŭ jubileon de "Jugoslavia Fervojisto" - organo de la Asocio, kiu senĉese aperas jam 35 jarojn. Tiuokaze oni eldonis specialan filatelistan "maksi-karton" kaj en la poŝtofiĉejo Ilidža la tutan tagon funkciis speciala stampilo.

La jarkunvenon ĉeestis dudeko da delegitoj el fervojistaj Esperanto-societoj kaj preskaŭ 200 aliaj gastoj i.a.

ankaŭ s-ro Tomišek reprezentanto de ĉeĥa sekcio de IFEF. Estis invitetaj ankaŭ aliaj IFEF-sekcioj, sed iliaj reprezentantoj estis malhelpataj veni kaj anstataŭ persona ĉeesto ili sendis salutleterojn kaj bondezirojn.

En la jarkunveno estis aprobita nova statuto de JAFE adaptita al aktualaj soci-politikaj cirkonstancoj en la lando (plurpartia sistemo, demokratiigo de la socio ktp.). En la faka parto de la kunveno oni aŭdis prelegon pri la 110-jara jubileo de fervojfaka lerneja sistemo en Jugoslavio, kiun preparis s-ro Dimitrije Janičić, prezidanto de Fervoja Esperanto-societo Beograd.

FERVOJA KORESPONDA SERVO

Bonvolu noti la novan adreson de la Fervoja Koresponda Servo (FKS):


Georges JOLY,
19, rue Seguin,
F-69002 LYON (Francio).

Se vi utiligas tiun ĉi servon, bonvolu indiki klare viajn nomon, aĝon, adreson, en kiuj landoj vi deziras korespondant(in)on, pri kiaj temoj ktp.

Aldonu internacian respondkuponon por ĉiu dezirata korespondadreso. Ni deziras al vi multe da sukceso.

F. ERO

El "Jugoslavia fervojisto"



Kiel ne trovi edzon?

ENIGMO

Deĉifru la subajn cifergroupojn laŭ jenaj vortdifinoj, havante antaŭvide, ke ĉiu cifero simbolas saman literon en ĉiuj vortoj:

1. 5-1-7-6: Unu el la du esperantaj formoj de la nomo de la ĉefgento loĝanta en eŭropa regiono norde de la Arkta Cirklo.

2. 7-5-2-11-8-6: Serozo, kiu tēgas la internon de la torako kaj la eksteron de la pulmoj.

3. 5-1-9-2-8-6: Aparato kapabla produkti tre mallarĝan kaj tre intensan lumondon kun preskaŭ perfekta reguleco.

4. 7-8-2-3-2-8-4: Decidiĝi favore al unu afero aŭ ago post komparo kun alia.

5. 8-2-10-8-1-10-4: Repreni la disponon de sumoj, kiujn oni deponis.

6. 9-7-2-8-10-1: Posedanta sciojn akiritajn per praktika observado kaj agado kaj kapabla uzi ilin.

7. 12-4-10-8-1-5-6: Kuniĝo el diverskoloraj pecoj de vitro, kunligitaj por formi desegnojn.

8. 10-1-11-8-6: Virbovo.

9. 9-12-2-5-10-1: Harmonie aŭ elegante maldika.

10. 13-1-12-6: Unu el la indoneziaj insuloj.

Anstataŭigu per la deĉifritaj literoj la ciferojn el la cifergroupoj: 5-1 3-1-8-6-13 7-1-8-6-5-1-9 7-5-4 5-1-11-10-2 6-5 5-1 12-6-8-10-6-13 kaj vi tralegos gravan sentencon.

Kompilis: Dimitar HAĜIEV

PREMIO

Post lotumado libropremion gajnas Svetla Nikolova el Sofio - "Mia vivo" de Trifon Ĥristovski.

Jen la solvo de Diagonaloj el "BE" n-ro 2/91:

Dekstren: 1. Vetero. 2. Motelo. 3. Raketo. 4. Kotono. 5. Pigo. 6. SAT. 8. Moto.

Maldekstren: 2. MEM. 3. Roto. 4. Kateto. 5. Pokero. 6. Sitelo. 7. Fagoto. 9. Tono.

1. Estu firme konvinkita, ke vi konstante estos sola. La pesimismo kreos en vi suferajn kaj malvenkajn humorojn, kiuj certe forpuŝos ĉiun viron.

2. Organizu vian vivon tiel kiel tion faras solecaj virinoj: renkontoj kun amikinoj, vesperaj spektadoj de televido, granda dimanĉa purigado ktp.

3. Absorbu la rolon de virino, kiu aŭskultas, kompatas, konsilas, alivorte dirite, fariĝu tipa amikino, en kiun ajn eĉ ne povas imagi, ke iu enamiĝus.

4. Trovu por vi konstantan amikinson, kun kiu vi parolos pri ĉio, vi iros ĉien kune, koncize dirite, amikino, kun kiu vi havu interkonsenton, ke neniu devas aliĝi al vi.

5. Ludu la rolon de amazonino, kiu estas fieraj kaj feliĉa, ĉar ŝi estas sola (malgraŭ ke vi estas nek la unua, nek la dua).

6. Ne turnu grandan atenton al via eksteraĵo: evitu la frizan salonon, ne aĉetadu novajn vestojn, ĉar tio simple ne havas sencon - kiu turnos atenton al vi?

7. Kondutu kiel granda intelektulino, esperante, ke vi tiel havos pli grandan ŝancon kaj eblecon.

8. En vira kompanio vi ne forgesu ŝajnigi vin, ke vi staras pli supre ol ili.

9. Firme pensu, ke la koketado estas signo de malbona konduto.

10. Estu certa, ke la "ideala viro" ekzistas kaj ne kontentiĝu per kiaj ajn kompromisoj.

11. Energie forpuŝu ĉiujn invitojn esti "inter la homoj", restu firme konvinkita, ke tie ne okazos al vi io interesa kaj signifa.

12. Evitu la virojn per konstanta pensado, ke "io" en vi, en via konduto al la homoj, en viaj imagoj ne estas en ordo.

Aldona konsilo por esperantistinoj: Praktiku kaj apliku Esperanton nur legante, skribante, korespondante kaj aŭskultante radioelsendojn. Vi evitu Esperantajn kunvenojn, kunsidojn, renkontojn, ekskursojn kaj vojaĝojn.

El la bulgara: N. NIKOLOV

A L V O K O

Teksto: Atanas KRUMOV

Muziko: Stefka STAMATOVA

1. Kun ĝo-jo en kō-ro ni ĉi-uj la-bo-ru sub ni-a va-lo-ra verd-
 ste-la stan-dar-do. 2. Ni 3. Per ti-o ni do-nu mo-des-tan al-
 por-ton ek-i-ri an-taŭ-en la ver-da bel-ar-to. Per

1. Kun ĝojo en koro
 ni ĉiuj laboru
 sub nia valora
 verdstela standardo.

2. Ni verku, traduku,
 ni pentru, deklamu,
 parolu kaj kantu
 en bela Esperanto.

3. Per tio ni donu
 modestan alporton
 ekiri antaŭen
 la verda belarto.

